

# Biblia Revuo



**Numero 3  
1995**

**Redaktoro: Donald Broadribb  
Melburno, Aŭstralio**

Ĉi tiu teksto de *Biblia Revuo 3* estis preparita per la optika signo-programo ABBYY FINEREADER EXPRESS laŭ ekzemplero de la originala numero aperinta en 1965.

## TABELO DE ENHAVO

<b>LA NOVTESTAMENTA KANONO KAJ EKUMENO</b> de J. Mánek .....	paĝo 1
<b>POEZIO HEBREA: HISTORIA RIGARDO</b> de Donald Broadribb.....	19

# LA NOVTESTAMENTA KANONO KAJ EKUMENO

de J. Mánek

Kiam aŭtoritata kolekto de kristanaj libroj, la novtestamenta kanono, estis kreata, la nomo kiun koncerna libro portis estis decida por akcepto aŭ neakcepto. (La situacio du la kompilado de la malnovtestamenta kanono estis simila.) Justino Martiro (ĉ. 100-165 p.K.) agnoskas la aŭtoritaton de la evangelioj pro la supozo ke ilin verkis akompanantoj de Kristo. La principo de apostola origino, en la unua epoko, estis la decida normo. Krom Mateon kaj Johanon oni inkludis ankaŭ la evangeliojn laŭ Marko kaj Luko nur ĉar oni supozis ilin disĉiploj de la apostoloj Petro kaj Paŭlo. La epistolojn oni ĉiam supozis verkoj de apostoloj. La Agojn oni supozis verko de Luko, kaj la Apokalipson verko de Johano. La apostolan verkaron oni taksis kiel normon de vera kristanismo, kaj la apostolojn kiel garantiantojn de pureco kaj nedifektebleco de la kristana revelacio. Ilia verkaro estis konsiderata sekuriga digo kontraŭ novaj kaj danĝeraj ideaj tendencoj.

Do la nomo kiun koncerna libro portis estis grava. Sed ĝi sola ne estis ŝlosilo kiu malfermus la pordon de la novtestamenta kanono. Ne ĉiu libro kiu portis la nomon de iu el la apostoloj estis akceptata en la kanonon. Ĉirilate ekzistas por ni valora atesto de Episkopo Serapion el Antioko, al kiu estis prezentata la Evangelio laŭ Petro. Li permesis uzi ĝin en la distrikto, sed kiam li estis atentigata pri ĝia gnostika karaktero, li malpermesis ĝin. Grava estas lia procedo. Li ne tuj rifuzis, sed li estis trompata de ĝia titolo. Nur pli detala rigardo al la doktrino kaj teologio de la evangelio estis decida por la rifuzo.<sup>1</sup> Tiel grupo de verkoj kiuj portis la nomojn de apostoloj viciĝis ĉe la ekleziaj patroj inter verkoj kiuj estis flankenmetataj kaj greke nomataj “atopa pante kaj dussebe” (“ĉiel netaŭgaj kaj malpiaj.” Eusebius opiniis tiaj la Evangelion laŭ Petro, la Evangelion laŭ Tomaso, la Agojn de Andreo, kc. Aliaj el tiuj verkoj estis rifuzataj kiel “notha” (malaŭtentikaj). Inter ili estis, ekz., la Apokalipso de Petro, la Agoj de

## Paŭlo kaj aliaj verkoj.

Do ne ĉiu libro kiu havis apostolan nomon estis akceptata en la kanonon. Ekzistis ankoraŭ alia mezurilo, la enhavo, t.e. vera aŭ falsa doktrino. Tiu ĉi mezurilo foje opiniigis pli grava ol la titolo de la verko. Nur tial povis esti inkludata inter la “homologoumena” (ĝenerale rekonataj libroj) la Epistolo al la Hebreoj, pri kiu longe ne ekzistis akordo. Precipe en la kristana okcidento ĝi ne estis kalkulata inter la epistoloj de Paŭlo. Tertulianus konsideris ĉi tiun epistolon kiel verkon de Barnabas. Sed ĉi tiu epistolo, simile al unu el ĝiaj ĉefmencioj, Melkicedek, ankaŭ ne montris originon, do estis sen patro kaj sen patrino; ĝi venis en la kanonon nur pro sia doktrina karaktero.

La divido de la protokristana literaturo en kanonan kaj nekanonan grupojn, kiel konturiĝis klare jam fine de la dua jarcento (se ne pli frue), tamen ne donis finon al la klasifika kaj pritaksa laboro. Tio plu daŭris en kelkaj kristanaj grupoj laŭ neanticipita direkto: diferencigo de la libroj en la kadro kiun prezentis la formiĝanta kanono. Teologiaj motivoj ekzistis, gvidantaj erarvojn kristanojn por ke ili rifuzu kelkajn novtestamentajn librojn. Irenaeus informas nin (ĉ. 185 p.K.) pri homoj kiuj rifuzis la Evangelion laŭ Johano. Ŝajne temas pri kristanoj kiujn Epiphanius poste karakterizis kiel *alogoj* (“senvortuloj”), ĉar ili kontraŭis la *logos* (“Vorton”). Ni ne multon scias pri ili. Irenaeus indikas per tiu nomo homojn kiuj estis kontentaj per malpli ol kvar evangelioj. Samtempe ŝajne li identigas ilin kun forĵetantoj ankaŭ de la spiritaĵoj pri kiuj parolas la apostolo Paŭlo en 1 Korintanoj 12. Tial ĉi tiuj homoj eble havis negativan opinion ankaŭ pri la leteroj de Paŭlo. Ankaŭ la plej influa persono en la tempo inter Paŭlo kaj Origenes, Markion, turnis sin kritike kontraŭ la libroj kiujn oni ĝenerale estimis kaj pri kiuj ne ekzistis dubo ke ili apartenas al la apostola atesto. Markion<sup>2</sup> kreis propran kanonon (ni ne scias ĉu tiu ja estis la unua provo formi kanonan

kadron, aŭ nur respondo kaj protesto kontraŭ kanono jam ekzistanta ĝerme). Li decidis agnoski kiel kanonaj 10 epistolojn de Paŭlo kaj el la evangelioj nur la Evangelion laŭ Luko. El tiu li tamen forigis ĉion kion li konsideris kiel apartenantan al la sfero de la demiurgo. Li flankenlasis la genealogion de Jesuo, kaj (eble) aliajn rakontojn ligitajn al la naskiĝo. El la fino de la evangelio li ellasis la krucumon. La Agojn de la Apostoloj li ne akceptis, ĉar ili al li ŝajnis influitaj de Petro. La Epistolon al la Hebreoj li konsideris tute neakceptebla por kristanoj. Ne estas facile scii kial ne plaĉis al li la kvara evangelio. Verŝajne laŭ lia opinio ĝia aŭtoro estis tro ankrita en la judaismo. La kvara evangelio ankaŭ ligas Kriston al la kreo de la mondo, kio laŭ la kredo de Markion estis la faro de la demiurgo.

La opinio de la alogoj kaj de Markion, kvankam ili ne estis kritikaj, estas tamen por ni la unua atesto pri konscio interne de la eklezio ke la novtestamentaj libroj ne havas unuforman teologion. Ĝis la atesto pri tiuj opinioj, estas evidente ke ne temis pri zorga kaj kritika ellaboro de diferencoj, sed, pli ĝuste, nur pri indiko ke kelkaj libroj kaj libropartoj laŭ la vidpunkto de kredo-devio montriĝis neakcepteblaj. Ankaŭ la pozitivan aserton de Klement de Aleksandrio<sup>3</sup> (ke la sinoptikuloj notis tion kio estis ekstere homa, *sarka*, en la historio de Jesuo, dum la evangeliisto Johano notis tion kio estas spirita, *pneumatika*) oni ne povas konsideri kiel precizan teologian konstaton pri la diferencoj interne de la kanono.

Nur dum la 16a jarcento, ĉe Erasmus, Luther, kaj Oko-lampado, oni povas paroli pri teologie motivita diferencigo interne de la novtestamenta kanono. Erasmus turnis sin kun kritikaj vortoj al la adreso de la Epistolo al la Hebreoj, al la dua kaj tria Epistoloj de Johano, kaj al la Apokalipso. Luther malkaŝe diris ke kvin libroj de la Nova Testamento sufiĉas por ĉiu kristano: La Evangelio laŭ Johano, la Epistoloj al la Romanoj, Galatoj, Efesanoj, kaj la unua Epistolo de Petro.

Precipe la leterojn de Paŭlo li konsideris ia kanono interne de la kanono. Kvankam li akceptis ĉiun libron de la Nova Testamento, li listis la Epistolon al la Hebreoj, la “pajlan” leteron de Jakobo, Judon, kaj la Apokalipson en malpli alta kategorio. Okolampado klarigis ke Jakobo, la dua Epistolo de Petro, la dua kaj tria Epistoloj de Johano, Judo, kaj la Apokalipso ne povas esti komparataj kun la aliaj novtestamentaj libroj. Sed ankaŭ en la Romkatolika Eklezio aperis similaj tendencoj. En 1566 Papo Sixtus<sup>7</sup> difinis malpli altan lokon al sep libroj jam “abnegaciataj” en la unuaj jarcentoj: la letero de Jakobo, la dua de Petro, la dua kaj tria de Johano, Hebreoj, kaj la Apokalipso, ankaŭ tri ĉapitroj da teksto en aliaj libroj.

Tiuj ĉi voĉoj kontraŭstaris fiksitajn limigojn de la kanono, pro teologiaj kaŭzoj. Laŭ severa senco de la vorto, tamen, temis ĉi tie nek pri kritika esploro, nek pri pli profunda analiza studo. Tiurilate oni povas plejparte nur mencii la konatan skolon en Tuebingen en la 19a jarcento. Tiu skolo, sekvante sian fondinton Ferdinando Baur, akcentis la rilaton inter historio kaj religio, kaj atribuis ĉiun novtestamentan dokumenton al iu fazo de la historia evoluo de la protoeklezio. En Petro ĝi trovis la sindoneman partoprenanton de hebrea formo de kristanismo; en Paŭlo la defendanton de la pagan-kristana formo.<sup>4</sup> Kelkajn verkojn de la novtestamenta kanono ĝi vicigis en la sferon de influo de Petro, la aliajn en la sferon de influo de Paŭlo. Ambaŭ sferojn ĝi opiniis kontraŭpoziciitaj, unu kontraŭ la alia. Kun helpo de la skemo de Hegel, kiun ĝi akceptis, ĝi opiniis kelkajn librojn kiel sintezon kiu moderigas, eĉ nuligas, la kontraŭpoziciojn. Laŭdire, temas precipe pri la Evangelio laŭ Johano.<sup>5</sup>

Surbaze de la skolo el Tuebingen kreskis liberala protestantismo, kiu koncentriĝis precipe je la diferencoj inter la sinoptikoj kaj Paŭlo, kaj kiu ofte trovis neforigeblan distancon inter Jesuo kaj la apostolo el Tarsus. Kun trograndigita

emfazo, ĝi parolis pri diferenca rilato al la Leĝo de Jesuo kaj de Paŭlo (pro la diferenco inter la pure homa Jesuo de la sinoptikoj kaj la praekzistinta ĉiela Kristo en la leteroj de Paŭlo), pri diferenco inter Paŭlo kaj la originala palestina kristanismo. Ĝi akcentis eĉ la diferencon inter la historiaj valoroj de la sinoptikoj kaj de Johano.

Kritika studo de teologia profilo de unuopaj novtestamentaj aŭtoroj kaj libroj daŭris ĝis niaj tagoj, kaj certe daŭros post ili. Diference de iama maniero de laboro, ĝi malpli suferas pro nemotivigitaj premisoj, ĝi estas pli sinteza, pli reala, kaj ĝiaj analizoj estas pli precizaj kaj konvinkaj. La laste atingitaj etapoj en kritika analizo de novtestamentaj libroj estas videblaj en la laboro de Marxen<sup>6</sup> kaj de Conzelmann.<sup>7</sup>

Per ĉiuj tiuspecaj laboroj estas evidente ke la teologio de la novtestamentaj aŭtoroj kaj libroj ne estas unuforma, ke en la kanono ni havas komplekson de libroj kun malsamaj teologiaj akcentoj. Per konciza resumo, ni povas provi esprimi ĉi tiujn diversajn sintenojn koncerne la ekstreme atingitajn limojn en kristologio, soteriologio, ekleziologio, eskatologio, antropologio, kaj etiko.

Ĉi tiuj diferencoj havas sian fundamenton jam en kelkaj malsamaj trajtoj de la kerigmo en la novtestamentaj libroj.<sup>8</sup> La t.n. *kerigmo de Jerusalemo*, kiu estas por ni konservata en *Agoj de la Apostoloj* (2:22; 10:37; kc.) dediĉas, diference de la *kerigmo de Paŭlo*, pli vastan atenton al la tagoj de la surtera vivo de Jesuo. La kerigmo de Paŭlo plejparte koncentriĝas al Kristo krucumita kaj revivigita. Ĝi tute ne mencias liajn potencajn agojn, kaj preskaŭ tute ne liajn vortojn. Laŭ la kerigmo de Jerusalemo, Kristo ne venis en la mondon sole por doni sin kiel oferon. Ankaŭ la vivo de la historia Jesuo estas parto de la decida historia evento.

Ĉar ĉe ĉiuj novtestamentaj aŭtoroj ni renkontas integran



teologion, kiu sin kompletigas per la unuopaj partoj (kaj tio estas io, kio ĉiam denove plenadmirigas nin), ĉiu aparta emfazo havas respondan aspekton en la ceteraj partoj de la teologio. Pli aŭ malpli da koncentriĝo je la soteriologio de la kruco esprimas sin, ekzemple, tiel ke ĉe Paŭlo en predikado la evangelio pri dia pardono estas metata en la unuan lokon, kaj nur poste venas la postulo pri konvertiĝo kaj pri nova vivmaniero.

Ĉe Luko la ordo estas inversa: unue pento, poste pardono. En la teologio kiu estas pli ekskluzive kruco-centra, estas ankaŭ pli akcentata la malproksimiĝo de la homo for de Dio (ĝia falo) — pli ol kie, pro la revelacia koncepto de la misio de Jesuo en la tagoj de lia surtera vivo, pli antaŭenvenas la etikaj kategorioj. Tie ekzistas inklino paroli ne pri peko kun la senco de totala forfalo, sed pri pekoj kiel unuopaj flankeniroj for de la dia vojo. Kie oni parolas pri la falo de la homo, tie kontraŭe pli esprimiĝas la kategoriaj pneŭmatikaj anstataŭ etikaj.

La utila ŝlosilo por plene kompreni la teologiajn diferencojn inter la novtestamentaj aŭtoroj estas ilia takso je la Malnova Testamento. Kie precipe forte estas akcentataj la kruco de Jesuo kaj la savo kiu venas per li, la interrilato de la malnovtestamenta kaj la novtestamenta epokoj, la sinaja kaj la golgota interligoj estas vidataj en akra antitezo de mallumo kaj lumo. Se la malnovtestamenta epoko havas ion pozitivan, do temas sole pri voto. Kontraŭe, kie temas pli pri la koncepto de gradoj de revelacio, kie la malnovtestamenta revelacio prezentas malpli altan gradon kompare kun la plej alta, novtestamenta — tie la akcento je la kruco ne antaŭen-prezentas sin tiom ekskluzive. La malnovtestamenta epoko en tiu ĉi kazo ne rigardas sole la lumon antaŭ si, sed ankaŭ la lumon kiu iam en malpli granda mezuro venis en la tempo de Moseo. La valorigo de la malnovtestamenta epoko en la unuopaj libroj kaj partoj de la Nova Testamento diras multon ankaŭ pri ilia kristologio. Ju pli la novtestamenta tempo, la novtestamenta

revelacio estas levata kvalite super la malnovtestamentan, des pli granda estas la inklino konfesi praekziston de Kristo, kaj lian venon el la pli alta, de imanentaj influoj ne superŝarĝita, mondo.

En la novtestamentaj libroj ankaŭ ne ekzistas unueca ekleziologio. La rilaton de la eklezio al la dia regno oni ne ĉie konforme konceptas. Kelkloke ambaŭ tiuj ĉi sferoj tre kunproksimiĝas, aliloke malpli. Estas diferencoj ankaŭ en la eskatologio, se la perspektivo de kelkaj libroj celas vivon kun forte masiva flanko sur renovigita tero, dum la aliaj libroj kaj sferoj alrigardas estadon apud la tero en la ĉiela mondo. Kelkloke havas lokon en la dia regno *sarks*, aliloke sole *soma*. Ĉi tiuj diferencoj, ĉe normativa karaktero de la biblia eskatologio, estas signifaj kaj influas la kristanan vivkoncepton. Ankaŭ ne estas unueco rilate al akcento je kronologiaj datoj en eskatologio. Kelkloke pli forte antaŭeniĝas futura eskatologio, aliloke inaŭgura aŭ aktuala. La diferencoj inter la novtestamentaj aŭtoroj montriĝas ankaŭ en ilia antropologio. Ili tuŝas ankaŭ etikdoktrinon. Dum la Jesuo de la sinoptikoj vokas siajn sekvanthojn al nediskriminanta amo al ĉiuj senescepte, ĉe Johano oni postulas la amon al fratoj kaj amikoj.

Ekzistas novtestamentaj aŭtoroj kiuj pli antaŭenstarigas la homan kolektivon ol la aliaj (ekz. la sinoptikuloj / Johano). Kie tiel estas, kie ne staras en la centro de atento sole la individua saviĝo, tie temas ankaŭ pri pli granda intereso je historio, pri inklino kompreni kristanisman laŭ ties historiaj taskoj, pri transformiĝo de surtera vivo en pli veran similecon. Poste ne temas pri vivo kaj morto kun ilia plej profunda teologia senco, sed ankaŭ pri ĉiutaga vivo, pri korpa sano, pri materiaj rimedoj por vivo. Ankaŭ la eksteran situacion de la kredanto, ne nur ties internan ligon kun Kristo, oni konsideras ĉi tie.

Al la teologio de la unuopaj novtestamentaj aŭtoroj respondas ankaŭ la reguloj en la novtestamentaj komunumoj.<sup>9</sup>

Sume, oni povas diri ke ili fidele spegulas la akcenton je pli granda objektiva aŭ subjektiva flanko de la revelacio. Kie estas pli forte akcentata la objektiva flanko de la revelacio, tie pli havas signifon la aŭtoritato de gvidantaj aŭtoritatoj, la oficoj en la eklezio; kie superas la subjektiva flanko de revelacio, tie pli valoriĝas la sendependa decido de unuopulo sub gvido de la Sankta Spirito, kaj por la ekstera, homa aŭtoritato estas malpli da loko.

Ne estas nia tasko doni ĉi tie plenan analizon de la teologio de la unuopaj novtestamentaj aŭtoroj kaj la enhavo de la diferencoj inter ili. Temas pri konstato ke ĉi tiuj diferencoj vere ekzistas, ke la Nova Testamento ne havas unuforman teologion. Pro tiu kaŭzo, bona prezento de la novtestamenta teologio estas ebla sole en partaj sekcioj, kun konsidero pri unuopaj sferoj kaj aŭtoroj, aŭ sekvo de gravaj nocioj, kun nova konsidero pri ilia specifa karaktero en la unuopaj libroj. Hodiaŭ ĝenerale oni forlasas la sintenon kiun ankoraŭ dum la dua mondmilito elektis Ethelbert Stauffer, kiam li provis sisteme kaj totale prilabori la novtestamentan teologion sen atento al la diversaj akcentoj de la novtestamentaj atestantoj.<sup>10</sup> (Eĉ la teologia pozicio de tiu aŭtoro estas hodiaŭ alia, kaj Stauffer nekompreneble kontraŭstarigas akre la Jesuon de la sinoptikoj kaj la apostolon Paŭlo.) La pli nova novtestamenta laboro iras prefere laŭ la vojo de Bultmann,<sup>11</sup> kiu sekvas la unuopajn teologiajn sferojn de la Nova Testamento apartigitajn, aŭ laŭ la vojo de la granda vortaro de Kittel<sup>12</sup> kie estas prezentataj klarigoj de unuopaj bibliaj vortoj kaj nocioj ankaŭ kun konsidero pri la specialaj akcentoj de la diversaj novtestamentaj verkintoj. Tiel, ekz., la nocio *dikaïosunē* (justeco) estas atentata aparte rilate al Mateo, Luko, la epistoloj laŭ Petro, la epistolo al la Hebreoj, Johano, Jakobo, Paŭlo — la atento estas dediĉata al signifaj nuancoj ĉe ĉi tiuj unuopaj atestantoj. Per tiu ĉi maniero de laboro samtempe estas videble en kiuj libroj tiu aŭ alia nocio prezentiĝas kaj kie ne. Simile faras tion ankaŭ Oscar Cullmann en sia

“kristologio.”

Analiza studo de la Nova Testamento ankaŭ havas tiun bonan flankon, ke ĝi kondukis ekzegezistojn al agnosko ke ĉe klarigo de la novtestamentaj libroj, aŭ iliaj unuopaj partoj, estas necese respekti la teologian kontekston de la koncerna libro kaj ke ne estas plu eble klarigi, ekz., la *Montpredikon* en Mateo per konkludoj el la paŭla teologio.

La neunuformeco de la novtestamentaj aŭtoroj tamen ne signifas absolutan diferencon. Sub ĉi tiu neunuformeco kuŝas komuna bazo. Ĉiuj novtestamentaj aŭtoroj komprenas la eventon *Jesuo Kristo* kiel dian intencon; ĉiuj estas plenigitaj per plena fido kaj sindonemo rilate al Kristo; ĉiuj konfesas ke ĉio koncernanta rilaton al Dio kaj al homoj devas esti destinita sole de li. Ili, ekzemple, diversmaniere esprimigas pri la morto de Jesuo kaj pri ĝia signifo, tamen por ĉiuj li estas la kaŝita loko de la dia potenco. Ĉiuj rigardas la morton de Jesuo kiel oferon. Tamen la akcento varias. Ĉiuj bazas sin sur la vidpunkto ke la celo de la dia ago en Jesuo Kristo estas kreo de vera rilato inter Dio kaj homoj. En la profundo de la novtestamenta kanono kuŝas ebena komuna por ĉiuj. Kiel oni devas vidi diversecon en la mezo de tiu ĉi unueco, tiel estas necese vidi ankaŭ la unuecon en la mezo de la diverseco.

La baza strukturo de kredo estas komuna en la Nova Testamento. Oni povas jene karakterizi la konformecon:<sup>14</sup> Plejunue temas pri konscia daŭrigo, fare de la novtestamentaj atestantoj, de la Malnova Testamento, t.e. de ĝia komunumo. Forlaso de ĉi tiu ligilo ĉiam sekvigis vojon kondukantan al herezo. Ĉiuj novtestamentaj libroj akordas pri la historia ekzisto de Jesuo. Eklezio ne povas dubi pri la ekzisto de tiu kies memoron ĝi celebras kaj memoras. Se ĝi tion farus, ĝi problematigus sian propran ekziston. La signifo de Kristo ĉe neniuj de la novtestamentaj aŭtoroj estas malpligrandigata. La nomo de Kristo devas esti super ĉiu nomo. Malpligrandigi la signifon

de Kristo signifus ankaŭ malpligrandigi la signifon de la eklezio kaj de ĝia misio. Ĉiuj novtestamentaj aŭtoroj kredas la reviviĝon de Kristo. La ekzisto de la eklezio estas intime ligita al la reviviĝo de Kristo. Ĉiuj libroj de la Nova Testamento atendas la parusion de Kristo, per kiu la verko de Kristo kulminos. La espero apartenas al la fundamento mem de eklezia vivo.

Se la analiza sinteno koncentriĝis je la diferencoj inter la novtestamentaj aŭtoroj, sinteza sinteno koncentriĝas ankaŭ je kio estas komuna. Ambaŭ ĉi tiujn sintenojn biblia laboro bezonas. La novtestamentajn librojn kaj aŭtorojn oni devas vidi kiel en senĉesa, mutuala dialogo en kiu troŝarĝo de unu akcento kaj forlaso de alia havas siajn konsekvencojn por la voĉoj kiuj respondas kaj kiuj reagas al kio estas forlasita aŭ malpli forte akcentata. La Epistolo laŭ Jakobo estas plejverŝajne la respondo al intelekta koncepto pri kredo, koncepto kiu postulas sole intelektan jesadon kaj kiun ni renkontas en, ekz., la pastoralaj leteroj. Kaj eĉ se la Epistolo laŭ Jakobo havas tre malmulte da kerigmaj elementoj kaj ne estas kristocentra (kiel ekzemplon de pacienco ĝi mencias Ijobon, ne Kriston), ĝi enhavas ion kio plipurigas kristanan fidon kaj estas kontraŭpoluso de ĉia spiritualismo kiu volas savi la animon sed al la frato ne donas panon. Ankaŭ la ekstreme futurisma eskatologio de la Apokalipso ne estas sensignifa por kristanaj kredo kaj espero. Ĝia perspektivo pri lumo montras finan triumfon de bono super malbono. La eklezio agis tre prudente, kiam ĝi ĉi tiun libron en la kanonon akceptis, ĉar la Apokalipso alportas mesaĝon ke la ŝlosilo por kompreni historion estas videbla en Kristo.

Nur la kompleta, ne mallongigita, Nova Testamento montras kiu estas Jesuo Kristo. Tamen la vero ne estas ĉe nur unu de la aŭtoroj, sed la vero kuŝas inter la diferencaj akcentoj — por montri ke ĉi tiun trezoron ni havas “nur en argilaj potoj” (2 Kor. 4:7).

La novtestamentaj aŭtoroj similas vicon de muzikantoj ludantaj diversajn instrumentojn, sed unu dominanta temo sonas en ilia muziko.<sup>15</sup> Ĉi tiuj diferencoj certe kondiĉas en la fakto ke la novtestamentaj libroj ne ekestiĝis en la sama tempo. Iuj estas pli maljunaj, la aliaj pli junaj. Tamen grava estas ne nur la kronologia faktoro, sed ankaŭ la geografia faktoro. La novtestamentaj libroj ne estis verkataj en la sama loko. La *Prologoj kontraŭ Marcion*<sup>16</sup> verkitaj en la jaroj 160-180 p.K. (el kiuj ni ekscias ke Mateo havis sian originon en Judujo, Marko en Italujo, kaj Luko en Aĥaja) eble ne estas precizaj, sed ili spegulas sendube la situacion de la protokristana literaturo kaj ĝian ekeston en diversaj lokoj. Krom la faktoroj kronologia kaj geografia rolis grave ankaŭ la faktoro de persona sperto. Alie spertis la potencon de Jesuo Kristo la kredanto veninta el judeco kaj la kredanto veninta el paganeco. Ni devas rigardi la Novan Testamenton dinamike kiel registron pri la evoluanta vivo de la komunumo, ne kiel priskribon de statika realeco. Temas pri skribaĵoj estiĝintaj dum la fluo de vivo en la protoeklezio kaj kiuj estis influataj de ĝiaj bezonoj kaj taskoj. Kelkaj novtestamentaj libroj montras apologion, aliaj polemikon, aliaj misian, aliaj animzorgan karakteron. La Nova Testamento estas respondo de la dia spirito interne de la eklezio al la ŝanĝoj en ĝia historio kaj al la ŝanĝoj en ĝia ĉirkaŭaĵo.

Ĉiuj novtestamentaj libroj apartenas, pro la tempo de ilia origino, al preskaŭ la sama epoko, nome al la dua parto de la unua jarcento. Escepto estas eble nur la dua letero de Petro. Ni do havas ĉi tie rigardon en la vivon de frutempaj kristanaj komunumoj dum la periodo de, proksimume, duonjarcento. Kaj kvankam temas pri la unuaj paŝoj de la eklezio kun mallonga tempa diferenco, estas evidente ke la kristanismo de la unuaj jaroj ne estis unueca. Estis diferencoj en la kulto, la kredo, la teologio, la organizo kaj la tipoj de religia aktivo. Ne ekzistis komuna konfeso (krom la konciza kredo ke "Jesuo estas Mastro"). Ekzistis multe da loka kaj regiona

sendependeco. La diferencigo de la eklezio rilate al la mondo tamen estas pli esprimplena ol la reciproka malsimileco de la grupoj interne de la eklezio.

La protoeklezio, kiun ni ofte prezentas kvazaŭ prototipon pro ĝia unueco, ne estis en sia doktrino kaj en sia vivo unuforma. Ĉiuj ĝiaj komunoj sentis sin partoj de la sama eklezio, tamen ili mutuale diferencis. Kaj tio estas grava fakto rilate al la temo kiun ni pritraktas. La eklezio de la apostola epoko kaj de la frutempa postapostola epoko estis tiel, en certa senco, antaŭbildo de la ekumeno de niaj tagoj. Inter la novtestamenta eklezio kaj la eklezio de niaj tagoj estas kaŭza rilato, nome ĉar la diversaj akcentoj de la novtestamenta mesaĝo ne estas sole afero estinta, sed la akcento kiun ni donas al la Skribo atingas ĝis nia epoko. Per tio ke la Nova Testamento parolas al ni, parolas ankaŭ al ni ĝiaj diferencaj vidpunktoj kaj akcentoj. La diferencoj kiuj montriĝas hodiaŭ inter la unuopaj teologoj kaj inter la unuopaj eklezioj, precipe inter la reformitaj, estas en sia ĝermo donitaj ofte jam per la neunuformeco de la novtestamenta mesaĝo.

Al la fakulo ne kaŝita estas la rekono ke, ekz., Oscar Cullmann, unu el la aktuale plejgravaj novtestamentuloj, estas en sia teologia koncepto forte influita de la skemo de sav-historio laŭ Luko. Plej klare ni vidas ĉi tiun influon en la verko de Cullman *Christus und die Zeit* (*Kristo kaj Tempo*). Ankaŭ ne estas hazardo ke K. Barth eniris ĉefan pozicion en la monda teologio per ekzegezo de la paŭla Epistolo al la Romanoj, kaj ke estas paŭla teologio kiu en lia sistemo havas dominantan pozicion. Leonhard Ragaz, kvankam li esprimas la ekzegezon de la tuta Biblio (*Die Bibel — eine Deutung*), precipe atentige haltas ĉe la jesua Montprediko, kiun li ekzegezas aparte kaj pli detale. Lia teologia koncepto estas de la mesaĝo de la Montprediko forte influita. Ankaŭ ne estas hazardo ke Rudolf Bultmann ekzegezis el la novtestamentaj libroj sole la Evangelion laŭ Johano. Ĉi tiu evangelio donas specialan bazon,

kaj subtenas lian aserton pri la sensignifo de la krista reveno je la fino de la mondo. Kaj Dietrich Bonhoeffer dankas sian allogeman teologion al la fakto ke li, kiel luterana teologo, ne kontentiĝis sole per Paŭlo kaj liaj epistoloj, sed ke li malfermis sin ankaŭ al la mesaĝo de aliaj novtestamentaj sferoj, ĉefe al la sinoptikaj evangelioj, el ili precipe al la Montprediko. La influo de la pli vasta tereno de la kanonaj libroj de la Nova Testamento kondukis lin al ekkono ke en la Skribo ne temas antaŭ ĉio pri persona savo, sed pri la surtera dia regno. Sole allasante la pli grandan vastecon de la novtestamenta bazo li povis atingi konvinkon kiun li esprimis per la vortoj “Nur la kredanto aŭskultas, kaj nur la obeanto kredas”.<sup>17</sup> Bone li vidis ke ni grave perfidas, se ni diras la unuan parton de la tezo sen la dua.

Sed ne sole la diferencoj inter la teologoj, sed ankaŭ la diferencoj inter la unuopaj eklezioj baziĝas ofte sur la diferenca orientiĝo al diversaj libroj kaj aŭtoroj de la Nova Testamento. Por la diferenco inter katolikismo kaj protestantismo certe ne estas sensignifa la fakto ke la protestantismo koncentriĝas pli al la epistoloj, al la apostolo Paŭlo, dum la katolikismo preferas la evangeliojn. Ĉi tiuj diferencoj montriĝas precipe kiam oni elektas tekstojn por predikado.

La signifon de la influo de la unuopaj partoj de la Nova Testamento por la vivo de la eklezio ni povas plej bone montri en la eklezia historio, karakterizante la t.n. unuan kaj duan reformaciojn. La unua reformacio, al kiu apartenas, ekz., la ĉeĥa Husitismo, koncentriĝis plejparte al la sinoptikaj evangelioj (el ili, precipe al la Montprediko) kaj al la Apokalipso. Tiu ĉi reformacio volis ŝanĝi la eklezion kaj la mondon. La dua reformacio, al kiu apartenas plejparte la reformacio de Luther, akcentis ĉefe la epistolojn de Paŭlo, la mesaĝon pri la graco kaj pri la pardono de pekoj kiu estas veninta per la krucumo de Kristo. Ĉi tiu reformacio ne estis radikala rilate al la sociala kaj ekonomia flankoj de la vivo. La socia resonon



de ĝia mesaĝo estis malforta. Gravis por ĝi pli la individua savo. Pro tio, ĝi ankaŭ ne estis popolamasa, kiel la unua reformacio, al kiu apartenis homoj el la plej malaltaj sociaj grupoj.<sup>18</sup> Oni povas prave diri ke pli ekskluziva orientiĝo de la teologoj aŭ de la eklezioj al difinitaj libroj de la Nova Testamento donas al ili ilian bazan teologian karakteron.

La koncentriĝo de teologoj aŭ de la eklezio al tiu aŭ al alia parto de la Nova Testamento estas certe kunligita al serioza serĉado je la mezurilo, je la aŭtoritato, je la vero kaj je la normo meze de diverseco. Ĉu la novtestamenta kanono havas sian mezon kaj siajn randojn? La akcepto de la Nova Testamento, kompleta, kiel de plejsuverena aŭtoritato mem, pravigas niajn diferencojn kaj nian dividitecon. Serĉi dogman unuiĝon de la eklezioj surbaze de la Nova Testamento estas malmulte esperige. Kaj la frazo kiun ni kelkfoje aŭdas, ke estas necese klopodi por “nova reunuiĝo” de la eklezio estas nevera, ĉar la eklezio cetere neniam, eĉ en sia komenco — al kiu ni laŭ la modelo de la Agoj de la Apostoloj ideale rigardas — estis unueca en siaj vivo, kredo, kaj doktrino.

Ĉu la ekumena movado de niaj tagoj devas havi sian paralelon en la strukturo de la novtestamenta kanono? Ĉu ia neunuformeco de ia novtestamenta eklezio devas esti komprenata kiel normiga por la eklezia vivo aktuala? Aŭ ĉu ni devas serĉi, por ekumena kunlaboro, pli bone la paralelon en frutempa katolikismo, kiu fontetis jam el la Nova Testamento, precipe el la Agoj de la Apostoloj kaj la Epistoloj al la Efesanoj? (La aŭtoro de la Agoj de la Apostoloj havis emon akcenti la signojn de unueco kaj ne menciis la streĉojn kaj diferencojn. Kaj la aŭtoro de la Epistolo al la Efesanoj ĉiam substrekis la unuecon, kvankam liaj formuloj eble pli indikas konfeson ke ĉi tia unueco en lia tempo mankis.) Ĉu ni povas preteriri la klopodojn de la frutempa katolikismo, kiu ja ne havis plenan sukceson en la procedo de la unuiĝo de la eklezio, sed kiu tamen donis al la eklezio pli grandan skalon de ekstera

unuco ol iam antaŭe aŭ poste, tiel ke la eklezio havis konscion ke ĝi estas unusola, universala, kaj apostola? Ĉu oni povas la aŭtoritaton de la protoeklezio limigi sole al la Nova Testamento? Aŭ ĉu ankaŭ la aŭtoritaton de tiuj kiuj konfesas kaj atestas pri “kion ili aŭdis, kion ili vidis per siaj propraj okuloj, kion ili rigardis kaj iliaj manoj palpis” (1 Johano 1:1)? La eliron el tiuj nefacilaj demandoj montras al ni certagrade la frutempa katolikismo mem, ĉar ĝi estis tiu kiu cele al unuco inter multaj grupoj kaj aliaj ideoj kaj praktikoj kompilis la novtestamentan kanonon. La akcento je la kanono tial estis ankaŭ akcento en la frutempa katolikismo. La eklezio de la unua jarcento produktis serion de libroj, sed la frutempa katolikismo kompilis la kanonon de la Nova Testamento, en kiu la unuco estas en neunuformeco, kiel ankaŭ en la kristana mondo eĉ hodiaŭ.

Laŭ la vidpunkto de reunuigaj tendencoj en kiuj oni akcentas precize limigitan kaj detale ellaboritan konfeson, laŭ la vidpunkto de tendencoj kiuj ne trovas la revelacion en la persono Jesuo Kristo sed en doktrino, la Biblio devas ŝajni malhelpo staranta sur la vojo al unuforma unuco de la diversaj eklezioj kaj kiel bariero al atingo de unuco sur doktrina fundamento. Tial, eĉ je la unuaj paŝoj de la ekumena movado aŭdiĝis averto kontraŭ la eblo ke la Biblio estu deklarata fundamento de la ekumena movado. En la stokholma konferenco de 1925 elstaris la fama novtestamenta fakulo Adolf Juelicher, kiu akcentis la neunuecon de la Biblio kaj sekve de tio ĝian neuzeblecon en la klopodo por unuco. Kiel biblia fakulo li konsilis al la eklezioj ke ili ne emfazu la Bibliion se ili volas akordi pri sama konfeso. Tute kontraŭan vidpunkton prezentis en 1947 ĉe la konferenco en Bossey K. Barth. Pasié oni diskutis tie pri la rilato de la Biblio al diversaj konfesioj. Kelkaj teologoj prezentis tie la opinion ke estas grave ke ni ne aŭskultu rekte la Bibliion, sed ke la Biblio estu studata en la lumo de konfesaj dokumentoj de diversaj grupoj. Barth staris energie kontraŭ tiu propono. Unu el la parolantoj havis

tiumomente antaŭ si libron en kiu estis la doktrino de lia eklezio. Barth fermis la libron, prenis sian grekan Novan Testamenton kaj metis ĝin sur ĝin. W. A. Visser't Hooft<sup>19</sup> pri tiu evento diras ke tio estis ago multe pli elokventa ol kiu ajn modo de interveno per vortoj. Tio estis prediko en formo de ago.

De la momento kiam la Biblio elprofundiĝis kiel aktiva unuiga faktoro, ekpaŝis la ekumena movado sanan vojon. La konstruktiva rilato inter la Biblio kaj la ekumena movado komenciĝis post 1930, do en la epoko kiam la negativaj trajtoj de biblia kritikado komencis malantaŭeniri kaj kiam biblia teologio komencis koncentrigi intereson je la fundamento de la biblia mesaĝo. La ekumenaj konferencoj aranĝitaj tiam havis devizojn: “La Biblio kiel loko de renkontiĝo,” aŭ “Ni renkontiĝos sur biblia bazo, nenie alie.” (Junulara konferenco en 1939 en Amsterdamo.) De tiu tempo ĉiuj konferencoj estas ligitaj al biblia studo. Rezulto de ĉiuj ĉi tiuj tendencoj estis grava, baza ekkono ke la Biblio ne forigas la diferencojn inter la eklezioj, sed ke ĝi ilin transcendas; ke ĝi estas pli granda ol la doktrinaj sistemoj kiujn la homoj sur ĝia bazo provis krei. Tamen, neniu el ĉi tiuj sistemoj estas tiel granda ke ĝi povas ampleksi la tutan Biblion.

La Biblio estas kiel preĝejo en kiu ĉiu eklezio havas sian lokon, se ĝi serioze rigardas la fakton de Kristo. La ekumena movado — ni uzu la frue jam menciitan bildon de Hunter — similas al grupo de muzikantoj el kiuj ĉiu ludas propran instrumenton, sed el ĉiuj instrumentoj sonas unusola dominantanta temo. La Biblio estas la plej granda aĵo kiu komune apartenas al ĉiuj eklezioj. Konfronte kun la Skribo kaj kun la multflankeco de ĝia mesaĝo ĉesos la unuopaj eklezioj opinii ke sole de ili oni povas aŭdi la dian vorton.

Vera manifesto de la pleneco de la krista korpo povas esti kreata sole sur la bazo kiu respondas al la novtestamenta

mesaĝo laŭ ĝiaj abundo kaj unueco, kaj ne sur la bazo de komuna specifika konfeso. La unueco de la novtestamentaj atestantoj ne estas dogma sed kristocentra, nome tial ke la vero kiun la Biblio mesaĝas ne estas donita en doktrinoj sed en persono. Jesuo Kristo kuntenas ĉiujn novtestamentajn librojn, kaj Jesuo Kristo kuntenas la ekleziojn en unueco. Dank' al lia iniciato, la ekumena movado ne estas nur homa afero. La eklezioj similas al la membroj de la korpo de Kristo, pri kiuj skribis Paŭlo en la 12a ĉapitro de la Unua Epistolo al la Korintanoj. Ĉiu el ili, se ĝi servas Kriston, havas ian karismon. Karismo estas ĉio kio en la vivo de eklezio havas fundamenton en la biblia mesaĝo. Per ĉi tiuj karismoj la eklezioj devas reciproke pliriĉiĝi.

La unueco de la eklezioj, bazita sur la Skribo, estas sufiĉe forta por alporti pli vastan diversecon de vivo kaj de praktikado. Ĝi, nome, ne signifas ian senliman toleremon. Ĝi signifas kristocentran kaj sinkretan unuecon. La Nova Testamento, kiu ne devigas la eklezion al komuna, detale ellaborita konfesa bazo, protektas samtempe la ekumenan movadon por ke ĝi ne malaperu en necerteco. La eklezioj kiuj konstruas sin laŭ la mesaĝo de la Skribo estas gvidataj de la fundamento de la Skribo al reciproka respekto. Ili komune kreas unu eklezion, dividitan en serion de eklezioj el kiuj neniu devas arogante opinii ke ĝi sola estas la unusola Eklezio de Kristo.

### Notoj

1. R. Knopf: *Einfuehrung in das Neue Testament*. 4a eldono, 1934.
2. C. R. Gregorv: *Einleitung in das Neue Testament*, 1909.
3. Eusebius: *Kirchengeschichte*, 1932.
4. Maurice Jones: *The New Testament in the 20th Century*, 1914.
5. W. Michaelis: *Einleitung in das Neue Testament*, 1954.

6. Willi Marxen: *Der Evangelist Markus*, 1955.
7. Hans Conzelmann: *Die Mitte der Zeit*, 4a eldono, 1962.
8. C. H. Dodd: *The Apostolic Preaching and Its Developments*, 1936.
9. Ed. Schweizer: *Gemeinde und Gemeindeordnung im Neuen Testament*, 1959.
10. E. Stauffer: *Die Theologie des Neuen Testaments*, 1945.
11. R. Bultmann: *Theologie des Neuen Testaments*, 1953.
12. G. Kittel: *Theologisches Woerterbuch*.
13. O. Cullmann: *Die Christologie des Neuen Testaments*. 3a eldono, 1963.
14. John Knox: *The Early Church and The Coming Great Church*, 1955.
15. A. M. Hunter: *The Unity of the New Testament*.
16. *Prologo kontraŭ Markion*. Huck: *Synopsis (enkonduko)*.
17. D. Bonhoeffer: *Sekvanteco*, 1962.
18. A. Molnar: *Fuer einer neutes Gespraech zweier Reformationen*, Glaube und Gewissen 10/ 1957.
19. W.A. Visser't Hooft: *The Bible and the Ecumenical Movement*, Bulletin of the United Bible Societies, 56, 1963, p. 165-171.

## POEZIO HEBREA: HISTORIA RIGARDO

de Donald Broadribb

Kvankam multaj esploroj pri la karaktero de la biblia hebrea poezio estas relative modernaj, la radikoj estas en frua epoko. Efektive, inter la tempo kiam oni verkis la poezion kaj kiam oni unue klopodis analizi ĝin pasis multaj jaroj. Estas probable ke ni neniam scios ĝuste kiel la hebreaj poetoj mem konceptis sian poezion. Multa analizo nia neeviteble estas kritikinda ĉar ni formuligas regulojn kaj metodojn dum la poeto mem efektive verkis instinkte aŭ nur parte konscie. Tamen, observeblaj faktoj devus malebligi al ni supozi ke tute ne ekzistis formala skemo.

Kiel mi mencias en posta artikolo, la frua atesto estas malmulta, Ekzistas ne nerefutebla sed tamen konvinka atesto ke la originalajn manuskriptojn poeziajn oni skribis en la formo de poeziaj linioj, kvankam la masoraj manuskriptoj kutime same traktas poezion kaj prozon tiurilate. Ankaŭ ekzistas indikoj ke strofa strukturo estis rekonata en la fruaj manuskriptoj.

Ni konas fruajn diskutojn pri la karaktero de la hebrea poezio nur el la kristana epoko. Josephus, Philo, Origenes, Eusebius, kaj Hieronymus konsideris la temon, laŭ nia scio. Tipaj estas la komentoj de Josephus:

Ili pasigis la tutan nokton per melodio kaj gajeco; Moseo mem komponis laŭ heksametraj versoj kanton al Dio por enkadrigi siajn laŭdojn—<sup>1</sup>

Tiam li deklamis al ili poemon en heksametraj versoj, kiujn li krome postlasis en libro konservata en la Templo....<sup>2</sup>

David, nun libera de militoj kaj danĝeroj, kaj de tiam ĝuante profundan pacon, komponis kantojn kaj himnojn al Dio laŭ diversaj metroj — kelkajn li faris laŭ trimetroj, kaj aliaj pentametroj.<sup>3</sup>

Bedaŭrige, ŝajne li donis neniun kontentigan eksplikon pri la senco de “heksametro, trimetro, pentametro” rilate al la poezio hebrea.

Pli grava ol la hazardaj mencioj de aliaj fruaj aŭtoroj estas la konsidero de Hieronymus pri la hebrea biblia poezio. Estante tradukanto de la biblia teksto, Hieronymus ŝajne zorge studis la poezian karakteron hebrean. Kelkaj el la rezultoj de lia studo aŭguris postajn konkludojn. Unue, liaj komentoj pri Ijob (kiuj similas al la karakterizado farita de Josephus, t.e. li aplikis la terminologion de la greka metriko) indikas kapablon distingi inter prozo kaj poezio kiu ne ĉiam ekzistis post tiu epoko:

Komence, do, de la volumo, ĝis parolas Ijob, laŭ la hebrea teksto ni havas prozon. Ek de la parolo de Ijob, kie li diras

Pereu la tago en kiu mi naskiĝis,  
Kaj la nokto kiu diris Embriiĝis homo  
ĝis antaŭ la fino de la volumo kie skribiĝis  
Tial mi faras al mi riproĉon,  
Kaj mi pentas en polvo kaj cindro.

ekzistas heksametraj versoj, konsistantaj el daktiloj kaj spondeoj. Pro la karaktero de la lingvo, aliaj piedoj eblas ankaŭ, ne kun similaj silaboj sed kun similaj tempodaŭroj.<sup>4</sup>

En sia letero numero 30 al Paŭla, Hieronymus komentas pri la alfabetaj poemoj en la Biblio, kaj dum sia komentado deklaras ke en Psalmo 110-111 ĉiu linio estas komencata per nova litero de la alfabeto, kaj oni havas jamban trimetron. Psalmo 144 kaj Readmono 32 enhavas jambajn trimetrojn. Necesas noti ke tio malakordas kun la deklaro de Josephus, jam citita, kiu diris ke Readmono 32 konsistas el heksametra versado.

En sia antaŭparolo al Jesaja Hieronymus pretendas ke

multo, sed ne la tuto, de la profetaĵo en Izrael havis poezian formon. Tiun veron oni ne agnoskis ofte post la tempo de Hieronymus, kaj ni trovas ke eĉ la relative nova verzio *Revised Standard Version* (1952) ne agnoskas tiom da poezio en la profetoj kiom Hieronymus agnoskis. Jesaja kaj Jeĥezkel estis tradukataj de Hieronymus kiel poeziaĵoj, kaj li zorge distingis la poeziajn liniojn kiam li skribis sian tradukon. Efektive, ne nur la linioj sed ankaŭ la lini-partoj estis distingataj, kion ŝajne oni forgesis dum pluraj jarcentoj post li.

Origenes ankaŭ komentis pri la poezia formo en la hebrea lingvo, kiam li diris pri Psalmo 118:1:

Jen linio. Ĉar hebreaj linioj, kiel iu diris, havas metrikon. La poezio en Readmono estas heksametra, dum la Psalmoj estas trimetraĵoj aŭ tetrametraĵoj. Sed la hebreaj linioj malsimilas niajn. Se ni volas konservi ilin, ni devas skribi la linion tiel:

*Bone estas al tiuj kies vojo estas senmakula, kiuj iras laŭ la leĝo de la Eternulo.*

Ni povas komenci la postan linion same. Oni devus kompreni ke la grekaj tradukintoj faris du liniojn el unusola hebrea linio (kiam ili skribis ĝin, ili metis la komencon de ĉiu linio ĉe la margeno), sed kion ili supozis la dua linio klare estis daŭrigo de la unua. Tion ili faris en la tuta teksto.<sup>5</sup>

Post la fruaj patroj de la Eklezio, ŝajne estis dekadenco en la poezia analizado hebrea, kaj nur en la dekoka jarcento diskuto rekomenciĝis serioze. Oni kutime mencias Lowth kiel la unuan gravan analiziston, sed Lowth mem mencias plurajn antaŭulojn. Li citas el pli frua juda verkisto, Abarbanel:

Ne estas dubeble ke la kantoj de la dua speco havis ian melodion aŭ metrikon, kiu pro la longeco de la Sklaveco perdiĝis.<sup>6</sup>



La celo de la cito estis demonstri ke la antikva hebrea poezio nepre baziĝis sur metrika sistemo, sed ke nun la sistemo estas por ĉiam perdita.

Dua mencio de Lowth pri juda verkisto estas eĉ pli interesa. Rabeno Azarias estas menciata, kaj ni trovas ekzemplon pri la analizo de Azarias:<sup>7</sup>

*Via-dekstra-mano, Jahŭe* = 2

*Estas-glora en-potenco* = 2

tiel ke la linio estas tetrametra. Simile:

*Verŝiĝos kiel-pluvo mia-instruo* = 3

*Fluos kiel-roso mia-parolo* = 3

estas heksametra.

Tia analizo havas aspekton rimarkinde similan al tiu poste trovita de Budde kaj detalita de Sievers, t.e. oni kalkulas gravajn vortojn (aŭ, laŭ Sievers, akcentatajn silabojn) por fari la bazon de metriko. Bedaŭrige, Lowth informas nin ne pli pri Rabeno Azarias kaj ties analizo.

Ni estas pli favorataj pri alia antaŭulo, Episkopo Hare, ĉar en apendico Lowth severe kritikis Hare, kaj farante tion donas iom detalan skizon pri la sistemo de Hare<sup>8</sup> Kvankam Lowth nur malrespektis la sistemon, kaj akre mokis ĝin, ĝi mirige similas al la sistemo nuntempe proponata de Mowinkel. Lowth ŝajne ne komprenis la esencon de la analizo de Hare, aŭ, se li ja komprenis, li ne volis montri tion. Tamen, lia represo pri la analizo farita de Hare pri psalmo 111 indikas la naturon de la sistemo tute klare:<sup>9</sup>

odéh javóh becól lebáb,  
besód jesárim ve'édáh.  
gédolim ma'asé jahvóh,  
derasím lecól chepzéhem.  
hód vehádar pó'aló  
vezidkathó 'omédeh lá'ad.  
zecér 'asáh leníphlotháv;

chánun vérachúm javóh.  
 téreph náthan líreáv,  
 jízcor lé'olám berítho.  
 coách ma'asáv higíd le'amó,  
 lathéth lahém nachállath góim.  
 ma'asé jadáv eméth umíspat;  
 neemánim col pikdúav:  
 semúcim lá'ad lé'olám,  
 'ásuím beeméth vejásar,  
 pedúth salách le'amó,  
 zívah le'olám berítho.  
 kádos vénorá semó;  
 resíth chocmáh jiráth javóh.  
 sécel tób lecól 'oséhem,  
 tehíllathó 'omédeh lá'ad.

Kiel oni vidas per la specimeno, la sistemo konsistas el alterne akcentataj kaj neakcentataj silaboj. Ĉiu lini-parto konsistas el precize kvar akcentataj silaboj, tiel ke la tuta linio enhavas ok. Foje estas du sinsekvaj neakcentataj silaboj, necesaj por la kalkulo, sed tio ne estas kutima. La prononco estas, simple, la masora, kun vokaligitaj ŝeŭa-oj, kaj oni ignoras plejparte la masoran akcentosistemon. La reguloj cititaj de Lowth el Hare (ĉu li vere citas, aŭ nur resumias laŭ sia kompreno de la principoj de Hare, mi ne scias) estas:

1. En la hebrea lingvo ĉiu piedo estas dusilaba.
2. Oni ne atentis la kvanton de la silaboj.
3. Kiam la nombro da silaboj estas para, la verso estas troĥea kaj oni akcentas la unuan silabon.
4. Se la nombro da silaboj estas nepara, oni traktas ilin kiel jambajn, kaj oni akcentas la duan silabon, por konservi la ritmon.
5. La grupoj konsistas plejparte el du versoj, ofte tri aŭ kvar, foje pli.

6. La versoj de la sama grupo, kun kelkaj esceptoj, havas similan karakteron.
7. La troĥeaj versoj plejparte similas pri nombro da piedoj; tamen ekzistas kelkaj esceptoj.

Ni notu ke (eble pro preseraro?) reguloj 3 kaj 4 rekte malakordas kun la teksto, sed oni trovas bonan akordon se oni legas “para” anstataŭ “nepara” kaj inverse, en la reguloj.

La atako farita de Lowth, krom ke li ŝajne ne komprenis la celon de la sistemo, restas ankoraŭ nun pli-malpli valida: la sistemo havas kiel bazon la masoran prononcon, kaj ni ne certas ke la masora prononco validis dum la epoko kiam oni verkis la materialon. Krome, la sistemo, kvankam ĝi akceptas la masoran sonsistemon, malakceptas la akcentosistemon masoran kaj, anstataŭe, supozigas ke ekzistis plene malregula akcento-skemo en la lingvo.

Lowth ne rimarkis, sed lingvisto tuj rimarkas, problemon pri tio. Se la akcento en iu termino dependis nur de la pozicio de tiu termino en la verso, do ŝajne akcento ne estis fonema en la klasika lingvo. Sed se akcento ne estis fonema, do ni tute ne havas metrikon sed nur ian ritmon. Tio ne nuligus la analizon, sed ĝi prezentus grandan problemon al ni rilate al la historio de la hebrea lingvo. (Por diskuto, vidu noton 10.)

Laŭtradicie, Lowth estas la unua kiu determinis la karakteron de hebreaj poezi-linioj kaj ties partoj. Kvankam liaj mencioj pri pli fruaj verkistoj montras ke tiu tradicio estas erara, lia verko *De Sacra Poesi Hebraeorum* (1753) ŝajne ja unuafoje inkludas detalan traktadon pri tiu aspekto de la hebrea poezio. Kiel ni trovas pri pluraj fruaj verkintoj, oni ignoris unue kelkajn el liaj konkludoj kaj nur poste oni retrovis ilin. Liaj ĉefaj kontribuoj al la temo ŝajne estas:<sup>11</sup>

Unue, li trovis kaj analizis paralelismen en la hebrea lingvo. T.e., ĉiu linio en hebrea poezio konsistas el du partoj

kiuj paralelas unu la alian per vortoj, pensoj, aŭ (nepre) gramatiko. Lowth distingis tri specojn de paralelismo: sinonima, antonima, kaj sinteza. En sinonima paralelado, individuaj pensoj de unu lini-parto estas ripetataj en la alia lini-parto. Ekzemple, en Jesaja 60:1:

*Leviĝu, lumiĝu; ĉar venas via lumo  
la majesto de Jahŭe ekbrilas super vi*

la vorto *venas* trovas paralelan vorton *ekbrilas*, kaj la *via lumo* paralelas al *la majesto de Jahŭe...vi*. Li ankaŭ sugestas ekzemplojn en Jesaja 60:2-3; Psalmo 114:3-4; Hoŝea 6:1-2.

Antonima paralelismo signifas ke pensojn en unu lini-parto kontrastas pensoj en la dua parto, ekz. en Sentencoj 27:6:

*Fidelkoraj estas la batoj de amanto;  
sed tro multaj estas la kisoj de malamanto.*

Komparu ankaŭ en Sentencoj 27:7; Jesaja 54:7-8; 65:13-14; 1 Samuel 2:4-7.

En sinteza paralelismo, kiun Lowth ankaŭ nomis konstrua paralelismo, la du lini-partoj donas kontinuan personon sed ekzistas gramatika simileco, ekz. Jesaja 14:9:

*Ĝi vekis por vi la mortintojn. ĉiujn potenculojn de la tero  
ĝi levis por vi de iliaj tronoj ĉiujn reĝojn de la  
popoloj.*

Lowth sugestas ankaŭ, kiel ekzemplojn, Psalmo 19:8-11, 77:18-19; Jesaja 14:4-8. Ĉi tiun kategorion de Lowth oni pleje kritikis. Liaj ekzemploj kutime montriĝas aŭ tute ne havi paralelismen, aŭ simili al la unuaj du kategorioj. Ŝajnas ke ni devas konsideri la trian kategorion nur ia kategorio por materialo malfacile klasifikebla.

Kvankam, plejparte, paralelismo troveblas en la du partoj de poezia linio, foje ekzistas linioj kun tri partoj, inter ili Lowth sugestas ke ni ekzamenu Psalmon 77:7, 17-20.

Due, Lowth agnoskis ke poezio ekzistas en la profetaj libroj, kaj li distingis prozan materialon de poezia.

Trie, Lowth agnoskis ian strofan strukturon, kvankam li ne detale diskutis ĝin. Jesaja 31:4; Zeharja 9:5; Psalmo 33:13-14; Readmono 32:43; jen kelkaj ekzemploj kiujn li donis.

Fine, Lowth agnoskis specialan poezian formon kiun li nomis Kinah, kvankam li ne povis precize determini kial ĝi estas distinginda. La poezio en la Plorkanto, en Psalmoj 19, 42, 43, kc, estis speciale citata. Li sugestis ke la linioj (mi nomus ilin lini-partoj) plejparte enhavas 12 silabojn laŭ la masora prononco, sed li ne estis certa kiom emfazi tiun rimarkon.

Kvankam konvinkita ke, por esti poezio, la hebrea materialo nepre originale havis ian metrikan karakteron, Lowth tiom skeptikis pri la masora prononco ke li tute ne akceptis ke ĝi povus esti iel valida. Ĉar li konis neniun alian tradicion pri la antikva prononco, li konkludis ke la antikva metrika skemo estas poreterne perdita.

Post la laboroj de Lowth, analizistoj plejofte emfazis nur unu aŭ alian aspekton de la poezia analizo anstataŭ strebi fari ĝeneralan karakterizadon. Ni devas, de nun, konsideri aparte teoriojn pri paralelismo, metriko, strofoj, kaj aliaj temoj.

### *Paralelismo*

Post Lowth, pasis longa tempo antaŭ ol la mondo ĝenerale agnoskis la karakteron de poeziaj linioj. Lowth parolis pri "versoĵ" anstataŭ linioj, kaj dum multaj jaroj oni kutimis supozi ke la masora vers-divido estas la bazo de la poezio. Eĉ en 1939 Lund proponis teorion bazitan sur la masoraj versoj, kvankam la klera mondo preskaŭ senescepte jam de longe ignoras ilin. Tiu manko de distingo inter verso kaj poezia linio senvalorigis multajn studojn. Kiel ni baldaŭ vidos, la valora strofa studado farita de Koester en 1832 nun estas preskaŭ

tute neuzebla pro tiu konfuzo. Oni diras ke nur en 1871, 140 jarojn post Lowth, Merx unuafoje emfazis la distingon inter linio kaj verso en sia *Das Gedicht von Hiob*.<sup>12</sup>

La distingo de specoj de paralelismo restas esence tiu farita de Lowth, kvankam posta studado plidetaligis la specojn. G. Buchanan Gray faris la “klasikan ekspozicion” de hebrea paralelismo dum ĉi tiu jarcento.<sup>13</sup> Lia analizo distingis inter plena paralelismo (=la sinonima paralelismo de Lowth), ekz. Psalmo 91:6:

*Nek peston kiu iras en mallumo,  
nek epidemion kiu ekstermas tagmeze*

kie ĉiu vorto en unu parto de la linio estas perfekte paralelata en la alia parto; nekompleta paralelismo sen kompenso, ekz. Amos 2:9c:

*Mi ekstermis liajn fruktojn supre  
kaj liajn radikojn malsupre*

kie unu aŭ pli da vortoj ne paraleliĝas en la dua parto; nekompleta paralelismo kun kompenso, ekz. Amos 4:2b:

*Oni forportos vin per hokoj  
kaj viajn idojn per fiŝhokoj*

kie unu el la tri vortoj en la unua parto ne estas paralelata en la dua parto, sed tria vorto aperas por ekvilibrigi la linion; kaj formala paralelismo (=la sinteza paralelismo de Lowth), ekz. Amos 5:11 b.<sup>14</sup>

*Vi konstruos domojn el hakitaj ŝtonoj  
sed vi ne loĝos en ili kie*

ni ne trovas klaran indikon de paralelado de individuaj vortoj.<sup>15</sup>

Tre zorga analizo de paralelismo, bazita sur la kategorioj de Gray sed kun pli da detalumado, estis la verko de Louis I. Newman kaj William Popper, en studo pri Amos kaj Jesaja 1-10 (1918). Newman konsideris zorge la similecon inter la hebrea paralelismo kaj tiu en la ĉina, egipta, babilonia, asiria,

araba, kaj suoma poezioj, kaj poste trovis en Amos plurajn ekzemplojn de kion li nomis kompleta paralelismo (simpla, aŭ kun duobla strukturo), nekompleta paralelismo (kun aŭ sen kompenso, kun kvar-terminaj variantoj), duobligo (linioj kie ne estas klare ĉu oni havas tri partojn aŭ nur du, ekz. Amos 2:2b, 4:5a, 5:21), alterna paralelismo (klara, preskaŭ-proza, ne-sinonima *saj*), Qinah-paralelismo, sinteza paralelismo (klara, duba), kaj aliaj specoj. Kaj Newman kaj Popper klopodis korekti tekstojn surbaze de paralelismo.

Du gravaj rimarkoj fareblas pro la laboro de Newman kaj Popper: unue, surbaze de ilia studo oni povas trovi paralelismen en preskaŭ ĉiu hebrea poezia linio; due, en la praktiko, oni uzis ĉiujn formojn de paralelismo sendistinge. Kvankam paralelismo en si mem estas distinganta karakterizaĵo de la hebrea poezio, uzo de specifaj formoj de paralelismo estas karakterizaĵo de la stilo de aŭtoro kaj nur relative malgrava rilate al la tuta karaktero de la poezio. Studo pri paralelismo ŝajne kulminis per la laboro de Newman kaj Popper, ĉar post ili esplorantoj (se oni povas juĝi laŭ la eldonaĵoj) ŝajne dediĉis sian atenton al aliaj aspektoj de la hebrea poezio.

Ankoraŭ nemulte esplorita aspekto de paralelismo estas la elekto de vortoj uzitaj. La trovo de ugarita materialo okazigis diskuton pri la rilato de ugarita poezio al la hebrea. Granda nombro da grupoj de paralelaj terminoj troveblas kaj en la hebrea kaj en la ugarita poezioj.<sup>16</sup> Ĝis nun tiu fenomeno ne estas integrita en ĝenerala teorio pri hebrea poezio, sed ĝi estas diskutita en mia neeldonita tezo.<sup>17</sup>

Flanken metante paralelismen, pri kiu ni trovas ĝeneralan akordon, ni povas konsideri la evoluon de teorioj pri hebrea metriko. Nun la studo kompleksiga, kaj la akordo estas nemulta.

*Metriko*

Mi jam menciis la deklarojn de pli fruaj verkintoj pri metriko en la hebrea poezio. Bedaŭrige, neniun eksplikon oni donis pri la vortoj kaj nomoj kiujn ili aplikis al la hebreaĵ fenomenoj, kaj pri la ŝajna malakordo kiam oni nomis Readmonon<sup>32</sup> heksametra (Josephus) kaj trimetra (Hieronymus). Mi menciis ankaŭ la sistemon de Rabeno Azarias, laŭ cito de Lowth. Denove, bedaŭrige, detaloj mankas, kvankam la sistemo ŝajnas identa kun tiu poste proponita de Budde. Tamen, dum la dekoka jarcento almenaŭ unu plenan sistemon de metriko proponis Episkopo Hare, kaj sendube ekzistis aliaj. C. G. Anton laŭdire difinis la karakteron de poeziaj linioj per studo pri la alfabetumitaj psalmoj, kaj poste ellaboris sistemon de metriko surbaze de kalkulo de akcentoj.<sup>18</sup> Tamen nur en 1875 metrikan studon eldonis Carl Budde, kiu estas la patro de la metrika sistemo nuntempe plej populara.<sup>19</sup>

Nelonge antaŭ ol aperis la verko de Budde, J. Ley eldonis studon pri hebrea ritmo.<sup>20</sup> Lia kontribuo inkludis agnoskon ke ĉiu linio konsistas el du partoj (jam notis tion Lowth), kaj ke la dua parto estas kutime malpli longa ol la unua.<sup>21</sup> Li provis fari fonetikan analizon pri la versoj, kaj establis fonetikan rilaton inter la partoj: ke la partoj interrilatatas laŭ la nombro da akcentataj silaboj, senatente al la nombro da neakcentataj.<sup>22</sup> Li do povus esti konsiderata la patro de la multe akceptata akcent-kalkula teorio, se oni post li ne devus ankoraŭ multe prilabori ĝin.

En 1882 la artikolo de Budde pri Plorkanto, hebree *Qinah*, kaj ties metriko aperis, kaj la posta influo de tiu artikolo estas notinda. Studantoj pri la Biblio ofte nun konas la terminon “Qinah metriko,” eĉ se ili tute ne konas aliajn partojn de la teorio kies konstruon tiel fundamente konstruis Budde. Budde, ni diru, unue estis skeptika pri la eblo trovi metrikan formon en la hebrea poezio, kaj li diris ke nur post multa mensa baraktado li sukcesis rekoni la Qinah metrikon.



La evoluo de la teorio parte ŝuldiĝis al serio de aprioraj supozoj, kaj oni lastatempe tre serioze ekdubas tiujn supozojn. Laŭ la artikolo de Budde, li komencis kun la rimarko farita de Ley pri la relativa longo de ĉiu lini-parto, kaj konkludis ke normala poezia linio devas maksimume havi kvin terminojn: tri en la unua kaj du en la dua partoj (kutime oni simple nomas tion 3+2 metriko). Por esti tute certa pri la limoj de poezia linio, li uzis ĉapitron 3 de Plorkanto, kie la alfabetuma strukturo de la hebrea teksto klare montras la komencon kaj finon de ĉiu linio. Laŭ skemo formulita surbaze de la laboro de Ley, kie oni ignoras unu-silabajn negravajn vortojn, Budde decidis ke tipa linio en la Plorkanto ja konsistas el 3 vortoj en la unua parto kaj 2 en la dua. Aliajn tekstojn li poste studis, ekz. Jesaja 44:4-21, Jeĥezkel 19, Psalmo 137, kaj konkludis ke antaŭ en ili la 3+2 sistemo estas fundamenta. Helpate de tekst-korektoj, li sukcesis eĉ konformigi plurajn el la “neregulaj” linioj.

Du notojn ni devus fari pri la laboro de Budde: unue, li ne provis fari fonetikan analizon kiel Ley kaj iuj posteuloj; due, kiel ofte rimarkigis proponantoj de metrik-teorioj, li ne rimarkis ke la 3+2 sistemo troveblas ĝenerale en la poezio kaj ne nur en lamenta poezio.

Budde nomis la skemon Qinah, ĉar li unue notis ĝin en Plorkanto (hebree: Qinah), kaj laŭ Budde ĝi estas la ĉefa skemo en poemoj kun la literatura karaktero de Plorkanto. Qinah metriko restas populara analiz-nomo, malgraŭ la mankoj en la studo de Budde. Ĉefa manko estas ke oni devas tre profunde korekti la tekstojn por povi trovi regulan Qinah-skemon en la poemoj.<sup>23</sup>

Post Budde pluraj verkistoj provis konstrui metrikan teorion laŭ la fundamento farita de Ley kaj Budde. Grimme laŭdire ekzamenis pri kiam vorto en poezia linio povas havi duoblan valoron, tiel ke (ekz.) Qinah-linio konsistus el nur

kvar vortoj (2+2, kie unu el la vortoj duoble pezas).<sup>24</sup> Tamen, Edward Sievers, kun sia verko *Metrische Studien I* (1901) evoluigis la teorion kiu nun estas klasika.

Sievers, post multa diskuto pri la ĝenerala karaktero de hebrea poezio, provis rekonstrui la prononcon de la antikva lingvo. Rilate al metriko, la celo estis trovi kie estas la akcentoj, tiel ke oni povas ilin kalkuli. Tre detala analizo donis sistemon kiu estis, pli-maibli, ellaboro de la teorio de Ley kaj Budde, sed por la tuta hebrea poezio.

Esence, la metodo estis tia: oni kalkulas akcentatajn silabojn en ĉiu linio por trovi ĉu ia sistemo ekzistas. Poemo laŭ la Qinah-skemo konsistas pleje el linioj kun 5 akcentataj silaboj, kiel mi jam rimarkigis. Aliaj skemoj eble estus 4 silaboj (2+2), 6 silaboj (3+3), kc. Ĝenerale, laŭ Sievers, gravas nur la sumo de akcentataj silaboj en la linio. La distribuo en la linio mem havas ankaŭ sistemon, sed li agnoskis ke, efektive, la sistemo ĉiam estas tre mairegula. La originala poeto, supozeble, uzis regulan sistemon, sed oni devas agnoski ke li estis iom libera pri tio.

La ligo inter prononco kaj kalkulo montriĝis malpli certa ol Sievers ŝajne agnoskis, ĉar lia teorio sukcesis vivi kvankam lia fonetika analizo jam delonge estas malakceptita. (Kp. en la verkoj de Theodore H. Robinson kaj William F. Albright.)

Resume, la metodo de Sievers estis kalkuli akcentatajn silabojn, laŭ sistemo kiu montras kiam longa vorto havas du akcentatajn silabojn, kaj kiu montras kiam ignori malpli "gravajn" unu- kaj du-silabajn vortojn (speciale prepoziciojn) kaj vortgrupojn. Kiel Budde, Sievers vaste korektis la tekston por trovi sian pretendatan skemon. Tre erara karaktero de lia laboro estis ke li plejparte ne ekzamenis tutajn tekstojn, sed nur individuajn liniojn elektitajn el multaj tekstoj. Rezulte, kiam li prezentas sian teorion ĝi konvinkas

multe pli ol kiam li prezentas tekstojn analizitajn laŭ la teorio.

Ĉar la teorio de Sievers estas multe respektata, mi prezentas specimenon. En parto du de sia *Metrische Studien* (1904), li prezentis 37 tekstojn analizitajn laŭ la metrika teorio. Laŭ la teorio, detale, oni analizas la poezion laŭ vers-piedoj. Unu piedo konsistas el akcentata silabo plus unu, du, aŭ tri neakcentataj silaboj. Oni povus havi:

x	—	
xx	—	
x	—	x
xx	—	x

kie x reprezentas neakcentatan silabon kaj — reprezentas akcentatan. En poezia linio oni kalkulas la nombron da piedoj. Se oni trovas tri piedojn en la unua parto de la linio kaj tri en la dua parto, oni nomas la linion 3+3 (aŭ 3:3); se tri en la unua kaj du en la dua, do 3+2 (3:2).

Sievers devis radikale korekti siajn tekstojn, kaj krom tio li agnoskis grandan malregulecon en la linioj. Tiel, se la sumo de la piedoj en linio devas esti 6, la partoj de la linio povus havi 3+3 aŭ 4+2 piedojn. Specimeno de lia analizo estas tiu por Psalmo 1. Kiam mi metas la kalkulon inter parentezoj, tio indikas ke la teksto estas “korektita” de Sievers:

- 6    Feliĉa estas-la-homo / kiu ne-iras / laŭ-konsiloj  
de-malpiuloj,
- 3+3    Nek-staras sur-vojo de-pekuloj, // Nek-sidas  
en-kunsido de-blasfemantoj;
- (3+3)    Sed-pri-la-leĝo de Jahŭe // li-havas-deziron tage  
kaj nokte.
- 4    Kaj-li-estos kiel-arbo / plantita apud-akvaj-  
torentoj //

- 3+3 Donanta sian-frukton en-sia-tempo // kaj-kies-  
folio ne velkas;
- 3 Kaj-en-ĉio kion-li-faras li-sukcesos //
- (6) Ne-tiel-estas-la-malpiuloj / sed ili-estas-kiel-  
grenventumaĵo kiun-disblovas la-vento.
- 3+3 Tial // ne-staros-fortike la-malpiuloj ĉe-la-juĝo //  
nek-la-pekuloj en-societo de-piuloj.
- (3):3 Ĉar konas Jahŭe la-piulojn // sed-la-vojo de-  
malpiuloj pereos.

Interesa kaj grava aspekto estas ke Sievers aplikis sian teorion al materialo kiu antaŭ kaj post lia tempo konsideriĝas kiel proza. Laŭ unu komentisto, Sievers tute ne kapablis trovi distingon inter prozo kaj poezio.<sup>26</sup> Efektive, la Meŝasteleo, Genezo 2, kaj Rut 1 estas zorge kaj metrike prezentataj de li, kun pluraj aliaj prozaĵoj el la hebrea Biblio.<sup>27</sup> Evidente, laŭ Sievers la dominanta karakterizo de hebrea poezio estas ritmo. En la tekstoj kiujn oni kutime nomas poeziaj, multa reguleco metrika ebligis por li nur per ignoro (kaj ofte revizio) de paralelismo.

Malgraŭ la mankoj en la analizo de Sievers, lia teorio fariĝis preskaŭ universale akceptata. Eble la kaŭzo estas ke eĉ nur 47% da reguleco estas tro impona por esti ignorata; aŭ eble ni trovu la kaŭzon en la konvinko kiun havas multaj studentoj ke la hebrea poezio nepre *devis* esti metrika. Komparu la deklaron de William F. Albright:

En mediteranea mondo kie muziko tiel alte evoluiĝis, oni tute ne povus koncepti ke ne ekzistis “regula metrika skemo” en normala kanaana kaj hebrea poezio, kiu ĉiam estis verkata por kantado.<sup>28</sup>

Multa poezia analizo estas farita surbaze de la laboro de Sievers. Inter aktualaj proponantoj de la teorio de Sievers, aŭ de modifita teorio, estas William F. Albright. Li

pretendas ke kaj en la ugarita kaj en la hebrea lingvoj metriko — esence tiu trovita de Sievers — troveblas.<sup>29</sup>

Varianto de la teorio de Sievers, kiun ni povas nomi la teorio pri Gravaj Terminoj, estas proponita de Theodore H. Robinson kaj formulita de li tiel:

Se poezia linio enhavas tri gravajn pensojn, kaj ilin kontraŭpezas tri aliaj, estas klare ke oni trovos tri gravajn terminojn en ĉiu liniparto. Ĉiu grava vorto, neatente al la nombro da silaboj en ĝi kaj la akcesoraj vortoj (ekz. prepozicioj), estas tiom dominata de unu sola akcentata silabo ke oni kutime povas ignori la aliajn por metrika analizo. Sekve, ni povas diri ke hebrea poezia linio estas nomebla laŭ la nombro da gravaj vortoj aŭ akcentoj en ĉiu parto...

Mi ankaŭ rimarkigu ke ŝajne foje eblas ke vorto estu tiom peza en signifo kaj sono ke ĝi havu la valoron de *du* logike necesaj terminoj. Tio okazas speciale kiam plurala vorto havas pronoman sufikson kaj estas antaŭata de prepozicio. Eĉ tiukaze, duoble akcentata vorto estas rara, kaj neniam aperas en duakcenta liniparto.<sup>30</sup>

El multaj specimenoj mi volas elekti du por plu ilustrati ĉi tiun teorion, ĉar ĝi estas tiel populara kaj (principe) akceptata. Psalmo 23 laŭ la sistemo de Robinson aspektas tiel:

- 3+2 Jahŭe estas-mia-paŝtisto mi-mankon-ne-havos  
sur-verdaj-herbejoj li-ripozigas-min
- 3+2 Apud-akvoj trankvilaj li-kondukas-min  
li-kvietigas mian-animon.
- 3+2 Li-kondukas-min laŭ-vojo de-la-vero  
pro sia-nomo.
- 2+2 Eĉ-kiam mi-iros  
tra-valo de-densa-mallumo

- 2+2 Mi-ne-timos malbonon  
ĉar-vi estas-kun-mi.
- 2+2 Via-bastono kaj-apogiĝilo  
ili trankviligos-min.
- 3+2 Vi-kovras por-mi tablon  
antaŭ miaj-malamikoj.
- 3+2 Vi-ŝmiris per-oleo mian-kapon  
mia-pokalo estas-plenigita.
- 3+2 Nur-bono kaj-favoro sekvos-min  
dum-la-daŭro de-mia-tuta-vivo.
- 3+2 Kaj-mi-restos en-la-domo de-Jahŭe  
dum-daŭros tempo.<sup>30</sup>

Estas interese kompari tiun analizon kun analizo bazita sur la sama sistemo sed farita de F. Buhl por la *Biblia Hebraica* red. Kittel:

- 3+2 Jahŭe estas-mia-paŝtisto mi-mankon-ne-havos,  
sur-kamparo li-ripozigas-min.
- 3+2 Apud-akvoj trankvilaj li-kondukas-min,  
li-kvietigas mian-animon.
- 3+2 Li-kondukas-min laŭ-vojo de-la-vero  
pro sia-nomo.
- 3+2 Eĉ-kiam-mi-iros tra-valo de-densa-mallumo,  
mi-ne-timos-malbonon.
- 3+2 Kun-mi estas-via-bastono kaj-apogiĝilo,  
ili trankviligos-min.
- 3+2 Vi-kovras por-mi tablon

antaŭ miaj-malamikoj.

3+2 Vi-ŝmiris per-oleo mian-kapon,  
mia-pokalo estas-plenigita.

3+2 Nur-bono kaj-favoro sekvos-min  
dum-la-daŭro de-mia-tuta-vivo.

3+2 Kaj-mi-restos en-la-domo de-Jahŭe  
dum-daŭros tempo.<sup>31</sup>

Reakcion kontraŭ metrikaj teorioj faris Cyrus H. Gordon, kiu neas son-metrikon en la ugarita lingvo, kaj kiu komencis sian atakon tiel:

Strukture variaj versoj kaj strofoj konstante aperas en la sama poemo en la ugarita lingvo. Konsekvence, estas nescience atribui similan variadon interne de biblipoemoj al la konfuziĝo de apartaj poemoj. Eble plej grave estas memori ke la poetoj de la antikva proksima oriento (ekz. Akada, Ugarita, Hebrea, Egipta) ne konis precizan metrikon. Tial korektoj *metri causa* estas pure fantaziaj. La atesto necesa por pruvi tion estas trovebla en la artikolo de C. D. Young en JNES 9 1950 124-125. Kiom malofte oni komprenas tiujn simplajn faktojn oni vidas per rigardo al la *m(etri) c(ausa)* korektoj en la Kittel M.T. aŭ en la verko de W. F. Albright pri la temo (ekz. HUCA 23 1 1950-1951 1-39; N. B. p. 7, N. 15: "la metrika nihilismo al kiu celas D-ro Young certe preterpasas racian diskutadon"). Ni nur postulas de personoj kiuj proponas metrikajn hipotezojn ke ili deklaru siajn metrikajn formulojn kaj demonstreu ke ili akordas kun la tekstoj. Anstataŭe, ili korektas la tekstojn por akordigi ilin kun la hipotezoj. Trafa indiko pri erarado estas la konstanta bezono subteni hipotezon per ankoraŭ pli da hipotezoj.<sup>32</sup>

Klopodo establi metrikan hipotezon laŭ alia bazo ol tiu

de Sievers fariĝis iom populara. Mi pli frue menciis ke ŝajne Episkopo Hare proponis sistemon de hebre-metrik, en kiu li supozis ke oni devas akcenti alternajn silabojn, kaj en poemo la nombro da akcentataj silaboj egalas en ĉiu linio. Tiun penson prilaboris Bickell, 1878, kaj poste Hoelscher, 1920, Horst, 1953, kaj Mowinckel lastatempe.<sup>33</sup> La teorio restas esence sama. Baze, la prononco supozata por la alterna sistemo de metrik estas la masora. Ĉar ĝi supozigas ke vorto povas enhavi pli ol unu akcentatan silabon, kaj ĝi ne multe konsideras la naturan akcenton de vortoj, la rezultoj multe diferencas de tiuj en la teorio de Sievers. Ĉar ĝi estas bazata sur prononco esence simila al la tradicia masora, ĝi, kiel la teorio de Sievers, trovas regulecon en poemo plejofte rara escepto kaj ne kutimaĵo. Stanislav Segert ebligis ke ni komparu la du sistemojn, publikigante analizon pri la Alta Kanto laŭ kvar principoj: la "Wortmetrik" (esence tiu de T. H. Robinson), la principo de Sievers, tiu de Haller (modifo de la sieversa, 1940), kaj la "Alternierende Metrik."<sup>34</sup> Du specimnaj tabeloj montras la similecon de la variantaj teorioj bazitaj sur Sievers, kaj la diferencon inter ili kaj la alterna analizo:

## I. (1, 2—4) Lied der Braut

	Wortmetrik	Akzentuierende Metrik		Alternierende Metrik
		Sievers 1901	Haller 1940	
2:	3+3	3+3	3+3	4,4
3a:	3	3:	3+2!	4
3b:	3+3	:3, an 2	3+3	3+3?
4a:	3+3	3:3	3+3	4,4?
4b:	3+3	3+3	3+3	4,4
4c:	2	2	dl	3/4



VI. (2, 8-14) Worte der Braut und ein Lied  
des Braeutigams

8a:	2+2/3	4:	2+2	2,2
8b:	2 (3)+2(3)	:4	2 + 2	3, 3
9a:	3+2(3)	5	dl	3,4/3
9b:	2+2	4?	2+2	3, 2
9c:	3/2+3/2	3+3?	2+2	3, 3
10:	4/3+3+2/3	3:(3)	dl, 3+2	4, 4/3, 3
11:	3/4+4	3:3	3+3	4,4
12a:	3+3	3:3	3, 3!!	4,3
12b:	2+2	3(4)?	3, 2!!	2, 2
13a:	3+4	3:(3)	3+3!	4,4
13b:	3+3/2	(3)	3+2	4? 3?
14a:	3+2	5	3+2	4,4
14b:	3/2+3/2	4:	2+2	3/4, 3/4
14c:	3/2+2	:4	2+2	3, 3

Teorioj bazataj sur aliaj principoj ankaŭ ne mankas. Unu iom heroa provo fari metrikan sistemon surbaze de la masora teksto, kun minimuma korekto, estas tiu de E. Lund (1939).<sup>35</sup> Rigardante la akcentskemon en la masora prononco, kaj uzante versojn anstataŭ liniojn, li diagnozis en Psalmo 58 ĉi tiun strukturon:

verso 2	4+4	(t.e. akcentoj)
3	4+4	
4	3+4	
5	4+4	
6	4+3	
7	4+4	
8	3+4	
9	4+4	

10	4+3
11	4+4
12	4+4

La skemo troveblas nur se oni iom malregule kalkulas, ekzemple foje inkludas kaj foje ekskludas iujn vortojn, kiel *kmw*. La poemo do aspektas dividebla en du simetriajn partojn, kunligitajn per verso 7.

Uzante iom kompleksan matematikan kalkulon, li trovas similan simetron en aliaj poemoj. Ekz., en ĉapitro 2 de la Alta Kanto:

versoj	<u>3+2</u>	<u>2+3</u>	<u>6+6</u>	<u>6+7</u>	5	<u>7+6</u>	<u>4+4</u>	6	<u>4+4</u>
1-9	<u>10</u>	<u>12</u>	<u>13</u>	<u>13</u>		<u>8</u>	<u>8</u>		
		<u>22</u>		<u>31</u>		<u>22</u>			
				75					

versoj	4	<u>3+2+3</u>	4	<u>6+4+6</u>	<u>5+6</u>	<u>4+4</u>	<u>4+4</u>	<u>4+4</u>	<u>4+4</u>
10-17		<u>8</u>		16	11	<u>8</u>	<u>8</u>	<u>8</u>	<u>8</u>
		<u>16</u>				<u>16</u>	<u>16</u>		
				<u>32</u>		<u>32</u>			
				75					

Por fari sian sistemon Lund malatentis la tradiciajn principojn de poezia literatura analizo, t.e. la linion, la strofon, la literaturan unuon foje ankaŭ paralelismojn, favore al la Masora vers-divido kaj la ĉapitro-divido presitaj en niaj nun uzataj Bibliojoj.

## Strofoj

Forturnante nian atenton de metriko, ni povas nun konsideri alian analizan sistemon pri kiu oni multe disputis, la strofo. La unua komentisto kiu prezentis detalan strofan teorion pri la hebrea poezio probable estis Friedrich Koester, en 1831.<sup>36</sup> Konvinkite ke la hebrea poezio estas esence strofa, kvankam foje la poezio inkludis pli precizan strofan karakteron ol alifoje, Koester komencis determini la regulojn por strofoj. Lia komencpunkto estis la paralelismo de poeziaj linioj, kaj li serĉis paralelismon inter linioj kaj linigrupoj.

Bedaŭrige por postaj studoj, la laboro de Koester estas preskaŭ plene senutila, ĉar li ne rekonis ke la masora versdivido ne ĉiam identas kun la lini-divido poezia. Supozante ke la verso identas kun linio, sed komprenante ke plejofte verso havas nur du aŭ tri partojn, li foje bezonis inkludi en sia paralelism-kompreno ian rilaton inter kvin, ses, aŭ eĉ sep vers-partoj. Malgraŭ tio, li faris la principojn de strofanalizo.

Inter la trovoj de Koester estas la rolo de ripetitaj linioj, ekz. en Jesaja 9:7-10:4, kie la ripeto indikas 4 strofojn de po 7 poeziaj linioj. La ofta termino *slh* (sela) en la Psalmoj supozigiĝis strofdividilo (tion subtenis la traduko *diapsalma=psalmparto* en la septuaginto), sed li agnoskis ke kelkfoje la kopiistoj miskopiis la terminon ĉar ili ne plu komprenis ĝin celon.

La principoj por trovi strofojn estis, specife, samaj kiel por trovi liniojn surbaze de paralelismo:

1. Vort-paralelismo, ekz. strofoj en la alfabetumaj psalmoj, kie la teksto estas alfabete aranĝita. Tiel, en Psalmo 119 la strofoj havas po 8 liniojn.

2. Sinonima pens-parallelismo, ekz. en Psalmo 24, kiu havas 5 strofojn de po 2 linioj; aŭ en Jesaja 9:7-10:4.

3. Antiteza pens-parallelismo, ekz. Psalmo 1 (1-3, 4-6).

4. Sinteza pens-parallelismo, ekz. Jesaja 5:1-6 (du strofoj de po 6 linioj).

5. Identita pens-parallelismo, ekz. en Jesaja 14:1-8. (Koes-ter pretendis 4 strofojn.)

Sekvante la studojn de Koester, D. H. Mueller en 1898 provis plu sistemigi la strofan strukturon.<sup>37</sup> Lia analizo inkludis la rilaton inter strofoj, kun rubrikoj *responcio*, *kunkatenigo*, *inkluzivo*. Nelonge post tiam, Paul Ruben pli vaste traktis strofanalizon kaj reviziis la trovojn de Koester, sed plu utiligis la masorajn versojn.<sup>38</sup> Li supozis ke ripetitaj linioj en la Psalmoj eble ne indikas egale longajn strofojn (ekz. Psalmoj 42, 43, 56, 107), pro sia kalkulo de versoj anstataŭ linioj. Lia studo ankaŭ estas iom senvalorigita ĉar li ne sukcesis ĉiam trovi la finon de poeziaj unuoj.

William Popper, en volumo kiu ankaŭ plurmaniere kulminigis la studon pri parallelismo (v. noton 14), entreprenis zorge ekzameni la strofstrukturon en 1 Jesaja surbaze de zorge distingitaj linioj. Jesajan 1-10 li dividis en strofojn de po unu aŭ du linioj (du aŭ kvar linipartoj).

La principoj por trovi strofojn estis, specife, samaj kiel por trovi liniojn surbaze de parallelismo:

1. Vort-parallelismo, ekz. strofoj en la alfabetumaj psalmoj, kie la teksto estas alfabete aranĝita. Tiel, en Psalmo 119 la strofoj havas po 8 liniojn.

Malgraŭ la favoraspekta komenco farita de Koester, neiu grava analizo estas ĝis nun publikigita por determini la pozicion de strofoj kiel regulan parton de la hebrea poezio, kvankam diversaj studantoj antaŭsupozas ilin. La tipa opinio estas ŝajne resumita de Oesterley kaj Robinson, kiuj opinias ke strofoj okazas nur sporade:

Ni povas ripeti ke ekzistas du nepre necesaj postuloj por ke ni povu agnoski strofan aranĝon. La unua estas reguleco de longo — eble eĉ identa longo por ĉiu strofo; la dua estas klara pens-divido fine de ĉiu strofo. Nur kiam la du postuloj estas plenumitaj ni povas prave diri ke la strukturo de iu poemo estas strofa.<sup>39</sup>

Ĉar la postuloj ne estas plenumitaj en la biblia poezio, plejofte, strofoj ne estas regula parto de la poezio.

Tamen, strofanalizo estas farita detale por multaj tekstoj. Menciinda estas la studo de A. Condamin (1933).<sup>40</sup> Lastatempe Samuel Terrien<sup>41</sup> analizis Ijobon kaj tie trovis iom kompleksan strofadon:

Ijobo 4:2-5:27 konsistas el 4 partoj: 4:2-11, 4:12-21, 5:1-7, 5:8-27. En parto 1 estas du sekcioj po du strofoj po tri kaj du linioj. En parto 2, la sama skemo troveblas, sed inversita. En parto 3, estas unu strofo kun sep linioj. En parto 4 estas du sekcioj po tri strofoj po tri linioj, kaj konkluda linio.

Profesoro en la sama instruejo kiel Terrien, James Muihlenburg, ankaŭ uzis strofanalizon, kaj la analizo farita de li pri 2 Jesaja inkludas strofsistemon.<sup>42</sup>

Aliaj aspektoj de la hebrea poezio estas ekzamenitaj kaj interese estas ilin rigardi, sed neniu el ili ĝis nun estas ĝenerale akceptata.

### *Aliteracio*

En 1929 Ignaz Gabor sugestis ke aliteracio estas grava faktoro en la hebrea poezio.<sup>43</sup> Li kungrupigis diversajn materialojn kie aliteracio troveblas, ekz. Jehezkel 22:37-50 (5

aliteracioj)); Hoŝea 12:2, 9:6; Jesaja 12:6, 17:2, 24:23; Miĥa 1: 6, 3:7; Naĥum 1:10, 2:11; Joel 2:16. Supozante ke oni ĉiam akcentis la unuan silabon de la radiko, Gabor listis diversajn specojn de aliteracio:

4 piedoj kun du akcentataj aliteraciaj silaboj, ekz. Sentencoj 16:17, 23:3

4 piedoj kun duobla aliteracio, ekz. Sentencoj 13:22

3 piedoj kun du akcentataj aliteraciaj silaboj, ekz. Sentencoj 13:34, 11:8

Tetrametro kaj trimetro kun triobla aliteracio, ekz. Sentencoj 14:35, 29:7

Tetrametro kaj trimetro kun du aliteraciaj silaboj en ĉiu linio, ekz. Sentencoj 18:24, 9:7, 11:4

Tetrametro kun triobla aliteracio, ekz. Sentencoj 16:14, 6:18, 15:27, 22:4, 28:19

Tia analizo supozigas iom ke ni scias kiel oni antike prononcis la hebrean lingvon, kvankam ĝi plejparte konsideras la konsonantojn. Gabor ne montris ke aliteracio estas normala parto de hebrea poezio, kaj li ne indikis iun tekston kie aliteracio estas konstanta karakterizaĵo.

Studo kiu eble interese kontribuos estas pri ripeto kiel formala karakterizaĵo de la poezio:

### *Ripeto*

En 1906 Condamin publikigis studon pri ripeto en la Plorkanto.<sup>44</sup> Li rimarkis ke estas simetrio en la strukturo de la hebrea poezio (jam antaŭ longe tion diris Koester), kaj li elektis Plorkanton kiel specimenon ĉar aliaj kriterioj ekzistas por povi trovi la komencon kaj finon de poemoj. En la unua ĉapitro de Plorkanto li notis simetrian ripeton en versoj:

kaj 22 rbt granda

kaj 21 'jn mnĥm. . .kl 'j(h)b nenu konsolas. . .

	ĉiuj amintoj/malamikoj
3 kaj 20	cr mizero
4 kaj 19	khn pastroj
5 kaj 18	hlk ŝbj iris en kaptitecon
6 kaj 17	cywn Cion
10 kaj 13	prŝ etendis
11 kaj 12	r'h nbŭ rigardu kaj vidu

Condamin ankaŭ rimarkis ke la strofa strukturo ne nepre akordas kun la alfabetuma skemo, kaj li dividis la poemon en du sekciojn (1-11, 12-22) en kiuj estas simetriaj strofoj: 1-3, 4-6, 7-11, 12-16, 17-19, 20-22.

Lastatempe Muilenburg<sup>45</sup> emfazis ripeton kiel ĉefan faktoron en la poezia strukturo. Li indikis, i.a., la Fabelon de Jotam (Juĝistoj 9:8-15) kiel imponan specimenon. Determino de la komenco kaj fino de poemoj surbaze de strukturo (speciale ripeto) ebligis ke li decidu ke 2 Jesaja estas integra verko, kaj ke la Servist-Kantoj estas integra parto de la pli granda poemkomplekso en kiu ili troviĝas.

Liebreich en 1956 faris detalan liston pri Psalmoj kie ĉefvortoj rolas.<sup>46</sup> Inter ili estas psalmoj kie ĉefvorto estas ripetita en la komenco kaj fino, kaj kie klare similas la komencaj kaj finaj versoj. Psalmojn 34 kaj 145 li analizis detale sur tiu bazo.

Mi ne povas nun mencii la laboron de multaj studintoj. Sed mi ja prezentis ĝeneralan rigardon al la analizo de la hebrea poezio ĝis nun, kaj mi provis resumi la tendencon de la studoj.

Du observoj fareblas. Unu: ke lastatempe oni malmulte provis sisteme analizi la poezion tutan, kiel Lowth; anstataŭe, oni emfazis specifajn faktorojn, kaj ofte tiel malaltentis aliajn faktorojn. Due, esceptante eble paralelismen, neniuj analizoj estas faritaj pri la tuta poezio kaj ankaŭ ĝenerale akceptata.



*Notojz*

1. Josephus: *Antikvaĵoj de la Judoj*, libro 2, ĉapitro 16, sekcio 4, pri Eliro 15.
2. *same*, libro 4, ĉapitro 8, sekcio 44, pri Readmono 32.
3. *same*, libro 7, ĉapitro 12, sekcio 3.
4. Hieronymus: "Praefatio in Librum Job."
5. Germanan tradukon de la teksto, kun interpreto, donis J. Ley: "Origenes ueber hebraeische Metrik" en *Zeitschrift fuer die alttestamentliche Wissenschaft*, vol.12, 1892, p. 212-217. La grekan tekston donis Erwin Preuschen en artikolo kun sama titolo, en la sama gazeto, vol. 11, 1891, p. 316-7.
6. Robert Lowth: *Lectures on the Sacred Poetry of the Hebrews*, tr. G. Gregory, 4a eldono, Londono, 1839, p. 191. Originala titolo: *De sacra poesi hebraeorum*, 1753.
7. *same*, p. 214-215.
8. *same*, p. 393-398.
9. Mi represas la transskribon en Lowth senŝanĝe, kvankam ĝi evidente enhavas preserarojn. Nur la hebrean literon 'ajin mi anstataŭigis per ' por ebligi la represon; tiun literon uzis Lowth en sia transskribo.
10. Tio estas: se akcento ne rolis en la lingvo por determini la signifon de individuaj vortoj (kiel ĝi rolas en, ekz., la angla lingvo: pĕrfume kaj perfúme, rébel kaj rebél, prógress kaj progréss, cónvict kaj convíct), do ni havas ritmon kaj ne metrikon. Akcento estas tiel ligita al la prononco de vortoj ke ni malfacile imagas lingvon kie akcento estas tute sensignifa. Sed en la franca aŭ angla lingvo oni povas facile fari frazojn el unusilabaj vortoj

por demonstri la ideon. Ekzemple, angle “he said he would go to school with me.” La leksikona senco de la frazo ne varias negrave kiel oni altigas aŭ emfazas iun el la vortoj. Oni povus kanti la frazon, laŭ iu ajn melodio, kaj tute ne perdi la sencon. La valoro de la frazo varius, kompreneble, sed la vortoj konservus sian sencon. Se la tuta lingvo havus similan karakteron, akcento estus “nefonema,” t.e. ne rolus en la senco de la vortoj, kaj la poezio — kiel en la franca lingvo — havus kiel bazon ne metrikon akcentan sed alian kriterion, eble la ritmo celita de la poeto, la nombro da silaboj, kc.

11. Mi donas koncizan resumon de la esenco de la studo de Lowth laŭ lia tuta libro. Krom kiam mi faras specialan noton, mi elektis ilustrajn ekzemplojn el tiuj donitaj de Lowth diversloke en la libro.
12. Laŭ Theodore H. Robinson: “Basic Principles of Hebrew Poetic Form” en *Festschrift A. Bertholet*, Tuebingen, 1950, p. 449.
13. G. Buchanan Gray: *The Forms of Hebrew Poetry*, en *The Ezpositor* vol. 8, 1913, p. 117-140, 557s., kaj aparte eldo-nita kiel libro, Londono, 1915.
14. La tri ekzemplojn de paralelismo mi ekstraktas el Louis I. Newman kaj William Popper: *Studies in Biblical Parallelism*, en la serio University of California Publications in Semitic Philology, (vol. 1, no. 2 kaj 3, p. 57-444), ankaŭ eldonita kiel aparta volumo, Berkeley, 1918, p. 141-170.
15. Mian diskuton pri Gray mi bazas sur Robinson (noto 12) kaj Newman kaj Popper (noto 14).
16. Kp. Cyrus H. Gordon: *Ugaritic Manual*, Romo, 1955; C. L. Feinberg: “The Poetic Structure of the Book of Job and the Ugaritic Literature” en *Bibliotheca Sacra*, vol. 103, 1946, p. 283-292; Stanley Gevirtz: “The Ugaritic Parallel to Jeremiah 8:23” en *Journal of Near Eastern Studies*, vol. 20, 1961, p. 41-46; H. L. Ginsburg: “Ugaritic Studies and the Bible,” en *The Biblical*

- Archaeologist*, vol. 8, 1945, p. 41-58; Robert Boling: "Synonymous Parallelism in the Psalms," en *Journal of Semitic Studies*, vol. 5, 1960, p. 221-255; U. Cassuto: *The Goddess Anath*, Jerusalem, 1953.
17. Donald Broadribb: *An Attempt to Delineate the Characteristic Structure of Classical (Biblical) Hebrew Poetry*, Univ. de Melbourne, 1964.
  18. C. G. Anton: *Conjectura de metro Hebraeorum antiquo*, Leipzig, 1770; laŭcito en E. Lund: "Eine metrische Form in Alten Testament," en *Acta Orientalia*, vol. 17, 1939, p. 251.
  19. Carl Budde: "Das hebraeische Klagelied," en *Zeitschrift fuer die alttestamentliche Wissenschaft*, 1882, p. 1-52; krome: "Zum hebraeischen Klagelied" en la sama gazeto, 1891, p. 234-247; 1892, p. 31-37, 261-275.
  20. J. Ley. *Grundzuege des Rhythms des Vers- und Strophenbaues in der hebraeischen Poesie*, Halle, 1875.
  21. Jenlaĉefakontribuo de Ley, laŭ Carl Budde (noto 19, p. 5).
  22. Tiun aspekton de lia laboro konsideris Robinson: "Basic Principles of Hebrew Poetic Form" (noto 12), p. 440; ĝi nepre influis la laboron de Budde, sed Budde malmulte mencias ĝin en sia verko.
  23. Ekzemple, en Plorkanto 3 (la unua ĉapitro analizita de Budde), el 66 linioj nur 37 havas 3+2 skemon; en Jeŝaja 44:4-21, el 31 linioj nur 21 havas 3+2 skemon; en Jeĥezkel 19, el 27 linioj nur 12 havas 3+2 skemon; en Psalmo 137, el 11 linioj nur 4 havas 3+2 skemon.
  24. Kp. H. Grimme: "Abriss der biblisch-hebraeischen Metrik," en *Zeitschrift der deutschen morgenlaendischen Gesellschaft*, vol. 50, 1896, p. 529-584; vol. 51, 1897, p. 683-712; menciita en Robinson (noto 12) p. 441.
  25. Analizo kaj cito laŭ Sievers, p. 500-501. Sievers mem donas la tekston en hebrea skribo kun kompleksa transskrib-sistemo kiun mi ne povas reprodukti ĉi tie. Mi do indikas, en la traduko, per streko (—) kiujn vortojn oni kunlegu

- por trovi “unu piedon.”
26. T. H. Robinson (noto 12), p. 443.
  27. El 338 linioj da psalm-tekstoj analizitaj en parto du de la libro de Sievers, 122 (33%) estas “korektitaj” kaj 54 ne akordas kun la preskribita skemo; tiel, nur 47% de la teksto efektive akordas kun lia analizo. Kompare, 42% de la Meŝa-steleo “montras” la metrikan skemon, 65% de Genezo 2, kaj 22% de Rut 1 (laŭ lia prezento).
  28. William F. Albright: “A Catalogue of Early Hebrew Lyric Poems (Psalm LXVIII)” en *Hebrew Union College Annual*, vol. 23, parto 1, Cincinnati, 1950-51, p. 6.
  29. William F. Albright: “The Old Testament and Canaanite Literature” en *Catholic Biblical Quarterly*, vol. 7, 1941, p. 21.
  30. Oesterley and Robinson: *An Introduction to the Books of the Old Testament*, New York (Meridian Books), 1958, p. 144. Ili tie donas la tekston en la angla lingvo (sed ne la hebrean). La analizo neniom ŝanĝas la tekston (sed necesis iomete retraduki iujn hebreajn vortojn por evidentigi la “metrikon”). Sed ĝi preskaŭ tute ignoras paralelismen.
  31. En la analizon de Buhl mi enmetis strekojn por indiki la vort-grupojn, kaj donis la materialon en traduko anstataŭ la hebrean tekston. Mi ankaŭ skribis la kalkulojn en la margeno, kaj metis en la tekston la korektojn kiujn li indikis en sia margeno.
  32. Cyrus H. Gordon: *Ugaritic Manual*, Romo, 1955, p. 108.
  33. Komparu: Sigmund Mowinckel: “Zum Problem der hebraeischen Metrik” en *Festschrift A. Bertholet* (v. noto 12), kaj “Die Metrik bei Jesus Sirach” en *Studia Theologica*, vol. 9, 1955, pp. 137-165.
  34. Stanislav Segert: “Die Versform des Hohenliedes” en *Charisteria Orientalia*, red. Felix Tauber, Vera Kubíčková, Ivan Hrbek, Praha, 1956, p. 285-299.
  35. E. Lund: “Eine metrische Form in Alten Testament,” en *Acta Orientalia*, vol. 17, 1939, p. 249-303, 499-509,

511-518.

36. Friedrich Koester: "Die Strophen, oder der Parallelismus der Verse der hebraeischen Poesie," en *Theologische Studien und Kritiken*, vol. 4, 1831, p. 40-114.
37. David Heinrich Mueller: *Strophenbau und Responion*, Wien, 1898; citita en Robinson (noto 12), p. 449.
38. Paul Ruben: "Strophic Forms in the Bible," en *The Jewish Quarterly Review*, vol. 11, 1899, p. 431-479.
39. Kiel noto 30, p. 149. T. H. Robinson detaligas la opinion en *The Poetry of the Old Testament*, London, 1947, p. 41-46.
40. Albert Condamin: *Poèmes de la Bible, avec une Introduction sur la Strophique Hébraïque*.
41. Samuel Terrien: "Introduction to Job" en *Interpreter's Bible*, vol. 3, New York kaj Nashville, 1954, p. 893-896.
42. James Muilenburg: "Commentary on Second Isaiah" en *Interpreter's Bible*, vol. 5, 1956, p. 381-773. Vidu ankaŭ "A Study in Hebrew Rhetoric: Repetition and Style," en *Supplements to Vetus Testamentum, Congress Volume 1953*, Leiden, 1954, p. 97-111.
43. Ignaz Gabor: *Der hebraeische Urrhythmus*, recenzita de Oliver Shaw Rankin "Alliteration in Hebrew Poetry," en *Journal of Theological Studies*, vol. 31, 1930, p. 285-291.
44. Albert Condamin: "Symmetrical Repetitions in Lamentations Chapters I and II" en *Journal of Theological Studies*, vol. 7, 1906, p. 137-140.
45. "A Study in Hebrew Rhetoric" (v. noton 42).
46. Leon J. Liebreich: "Psalms 34 and 145 in the Light of Their Key Words," en *Hebrew Union College Annual*, vol. 27, 1956, p. 181-192.